Kara Bardhyl, mi kore dankas pro la ricevo de la nova Bulteno numero 93 de la Albana Esperanto Instituto. Mi tralegis gin preskau je unu horo. Gi havas interesajn artikolojn, kun kelkaj konstatoj en kiuj mi ne estas tute konsenta, sed tio estos temo de alia letero kaj eble respondo per alia artikolo. Nun mi sendas al vi mian plej novan artikolon pri neologismoj, kiun mi jhus finis. Gi ne estas gis nun publikigita, kaj se vi trovas gin interesa, vi povas por unua fojo publikigi gin en vian Bultenon. Mi ankoraufoje kore salutas vin kaj bondeziras pluajn sukcesojn en via obstina kaj nobla poresperanta agado.
Sincere via: Nikola UZUNOV

Roberto

Ribeiro

(Brazilo)

<pb1318113@hotmail.com>

Ja, tio estas komuna al kiuj vivis en 20-a jarcento. Mi logis en cefa havenurbo de Brazilo, kie vivas multaj europanoj, sed mi vidis koloran televidon nur kiam mi estis 11-jaraga, mi parolis per telefono kiam mi estis 13-jaraga kaj mi uzis

komputilon kiam mi estis 20-jaraga. Mia edzino, kiu logis en malgranda urbo internalande, konis elektrikon kaj duson, kiam si estis 17-jaraga kaj vojagis al

granda urbo. Mia bopatro konkeris la koron de mia bopatrino (au plibone de sia patro) per bateria radio, kiun li portis ciutage al sia domo.

Roberto

Informajoj

NASK -Nord-amerika Somera Kursaro de Esperanto / North American Summer Esperanto Institute

La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) sangas la formaton de

la 42-a sesio en 2011! Anstatau

la tri-semajna dauro, NASK okazigos mallongan

sesion de nur sep tagoj de intensa instruado dum la usona feria semajno de la 4a

de julio (2-10-a de julio 2011). Tiu sango estas farita por allogi la lernantojn kiuj

ne havas sufice da feria tempo au

mono por pli longa sesio. La loko -la sunplena

kampuso de la Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD) -restas la sama.

Ciu inter la agoj 16 kaj96 (au

ec

pli) de cie en la mondo estas bonvenaj!

Mallonga tempo kaj malmultekosta kursaro (kiu ne enkalkuligas kiel universitata

studo) ebligas pli da libereco en la arangoj. Pro la lunda feria tago en Usono, la

usonanoj devos foresti de la laborejo nur kvar tagojn (kvin por ne-usonanoj). Vi

povas do alveni sabaton, la duan de julio, kaj foriri jam la dekan.

Partoprenantoj logos kvarope en apartamentoj kun individuaj dormcambroj, kun

tri mangoj tage, en la apartamentejo \"Inter

SURPRIZOJ

ne

nur

lingvaj

kaj

transportaj

Andrzej

Grzebowski

Dum

17-28-a

de

februaro

2011

grupo

de

Internacia

Klubo

Esperantotur

en

Bydgoszcz,

Pollando

vojagis

tra

Omano

kaj

Unuigintaj

Arabaj

Emirlandoj.

Ni

planis

flugi

al

Dubai

per

Air

Baltic,

kiu

ofertis

la

plej

malaltan

flugprezon.

Tamen

en

Varsovio

post

45

minuta

sidado

en

aviadilo

ni

eksciis,

ke

nia

aviadilo

paneis

kaj

ne

eblos

per

gi

flugi.

Rekompence

Air

Baltic

arangis

por

ni

vespermangon,

tranokton

kun

matenmangon

en

luksa

varsovia

hotelo

VICTORIA.

Sekvontage

ni

flugis

el

Varsovio

per

AEROFLOT

tra

Moskvo

al

Dubai.

Ni

sukcesis

bone

viziti

Dubai

i.a.

kun

luksega

lunco

en

hotelo

ATLANTIS,

ankau

hotelon

Burj

Al

Arab

kaj

la

plej

altan

en

la

mondo

828

metran

turon

Burj

Khalifa

kaj

muzikajn

spektaklojn

de

lumigitaj

akvofontanoj

apud

Dubai

Mall.

Fine

ni

esipigis

al

luksa

–

la

plej

nova

sipo

Costa

Deliziosa

de

itala

sipkampanio

COSTA,

kiu

posedas

nun

15

sipoj

por

c.

2-3

mil

pasageroj

ciu.

Surprizis

nin,

ke

en

tiu-ci

sipo

oni

parolas

ne

nur

en

la

angla

kiel

en

amerikaj

sipkompanioj

Princess,

Royal

Carribbean

kaj

Norvegian

Cruise

Lines,

sed

ciuj

komunikoj

ili

lautigas

en

iliajn

oficialajn

lingvojn:

itala,

franca,

germana,

hispana

kaj

angla,

krome

pluaj

informoj

kaj

ec

oficistoj

kaj

ekskursaj

ciceronoj

laboras

ankau

en

rusa,

cina,

japana

kaj

portugala

lingvo,

do

atmosfero

estis

multe

pli

demokratia

ol

ce

amerikaj

ekskursipoj.

Mi

havis

komparon,

car

dum

lastaj

kvin

jaroj

mi

sukcesis

gvidi

Esperanto

kaj

pollingvajn

grupojn

dum

pli

ol

20

sipkrozadoj.

Sursipe

atendis

nin

sekva

surprizo-anstatau

planata

sipkrozado

Unuigintaj

Arabaj

Emirlandoj

–

Omano

kaj

Barajno

ni

sipkrozadis

nur

al

Omano-

Muskat

(du

tagoj

anstatau

unu),

poste

Fujairah,

Abu

Dhabi,

Dubai

de

kie

ni

ekskursis

ankau

al

Sharjah

–

do

el

sep

emirlandoj

de

UAE

ni

vizitis

kvar.

Plej

impresis

nin

belega

cefurbo

de

Omano-

Muscat

kaj

ankau

la

cefurbo

de

UAE-Abu

Dhabi,

kompreneble

krom

Dubai

–

la

plej

luksa

urbo.

Ni

reflugis

el

Dubai

tra

Riga

al

Varsovio

per

AIR

BALTIC

kie

necesas

pagi

po

20

EUR

por

ciu

valizo

kaj

sen

mangado

tamen

ni

travivis.

Fakte

ni

unue

planis

la

saman

itineron

en

la

samaj

datoj

per

sipo

Brillance

of

the

Seas,

sed

tri

monatoj

antaue

la

sipkompanio

RRCL

rezignis

pri

Barajno.

Eble

jam

la

5-a

Usona

Armeo,

kiu

estas

en

Barajno

jam

sciis,

ke

en

februaro

2011

okazos

tie

mortigado

de

logantoj

kaj

tial

RRCL

el

Miami

preferis

nuligi

la

sipkrozadon

al

Barajno?

La

plej

grava

estas

tamen

sekureco

de

pli

ol

tri

mil

pasageroj,

do

neniu

protestis

kontrau

sango

de

itinero.

Certe

ni

dank'al

tiu

sango

de

sipo

ekkonis

novan

sipkompanion

–

COSTA

sajne

pli

demokratan

kaj

amikan

al

pasageroj

ol

amerikaj

sipkompanioj.

Tiu

ci-luksa

sipkrozado

kostis

relative

nemulte,

dank’al

50%

rabatoj

de

Esperantotur

kaj

Costa.

Se

Vi

satas

kaj

povas

multe

mangi

sursipe

(mi

sukcesas

ec

sepfoje

tage)

tiam

ciuj

aliaj

servoj

kiel

tranoktoj,

sipveturado,

rica

kultura,

sporta

kaj

parte

turisma

programo

estas

senpagaj.

La

sipkrozadoj

kostas

simile

kiel

multaj

Esperanto-kongresoj

sed

donas

pli

luksajn

servojn.

Utiligu

tiu

sancon

kaj

sipkrozadu

kun

grupoj

de

Esperantotur

klopodante

interesigi

pri

Esperanto

sippasagerojn

multlingvajn

kaj

multnaciajn.

Legu

pliaj

informoj

en

la

Turisma

Esperanto-

Kalendaro

de

Esperantotur

por

2011/2012.

Dezirante

sukcesajn

sipkrozadojn

kaj

aliaj

Esperanto-vojagoj.

Kore

salutas

Andrzej

Grzebowski

Prezidanto

de

Internacia

Klubo

ESPERANTOTUR

str.

M.

Sklodowskiej-Curie

10

PL

85-094

BYDGOSZCZ,

Pollando

Tel/fakso

48-52/3461151,

rete:

info@esperanto.bydgoszcz.eu;

andreo@rubikon.net.pl

Multaj

estas

la

kialoj

por

vojagi

al

Torino

en

augusto

2011!!!

Okaze

de

kongreso

de

italaj

esperantistoj

-por

la

78a

Kongreso,

kiu

estas

chiujare

chiam

pli

internacia,

-por

kompreneble

viziti

la

belegan

urbon

kaj

chirkauajhojn

(plenplenajn

je

muzeoj,

kasteloj,

lagoj,

ktp),

-por

la

organizantoj,

kiuj

estas

chiam

pretaj

kontentigi

la

kongresanojn

(

;)

),

-por

celebri

la

150-an

datrevenon

de

unuigo

de

Italujo,

-por

la

koncertoj

(ege

internaciaj),

-por

la

seminarioj.

Chi-jare

unu

el

la

Seminarioj

ricevis

Europan

subvencion

kadre

de

la

projekto

Grundtvig

–

la

eksterlandanoj

kiuj

partoprenos

gin

sekve

ricevos

rabaton

en

logado:

por

informoj

pri

la

seminario,

vizitu

la

pagojn

http://seminario.esperanto.it;

por

sendi

aligpeton

al

gi,

plenigu

la

aligilon

al

la

kongreso,

respondante,

indikante,

ke

vi

deziras

partopreni,

kaj

respondante

al

la

postaj

demandoj.

Se

vi

jam

aligis

al

la

kongreso

ne

menciante,

ke

vi

partoprenos

la

seminarion,

vi

povas

modifi

vian

aligon,

-por

la

ekzamenoj

KER:

Torino

estas

unu

el

la

4

mondaj

okazoj

chijare

por

ekzamenigi

pri

Esperanto

lau

la

Europa

normokadro

KER!

-por

la

kursoj,

prelegoj

ktp,

chiuj

tre

interesaj

(kiel

kutime)

.

Do

venu

chiuj

mulnombraj

al

Torino

de

la

20a

gis

la

27a

de

augusto,

la

kongresejo

estos

en

belega

vilao

(4-stela)

kun

parko,

sur

monteto

apud

la

urbocentro:

vi

povos

logi

konforte

tie

en

unu-au

du-litaj

chambroj,

au

en

la

apuda

4-stela

hotelo

''Crimea'',

au

en

tendo

au

en

studenta

domo,

do

vi

povos

elekti

tion

kion

vi

volas

kaj

vi

bezonas.

Aligu

aligu

aligu:

http://kongreso.esperanto.it

au

http://italakongreso.esperantoitalia.it

Dankon...

ni

atendas

vin

en

Torino!

Karaj Geamikoj,

Jam de pli ol unu kaj duona monatoj ne audigas la novaj E-programoj de Pola Radio chesigitaj fine de januaro malgrau divers¬nivelaj intervenoj kaj klopodoj restarigi ilian emisiadon.

Tial do, lau iniciato de la plej aktivaj auskultantoj de tiuj chi programoj kaj multonombra socio de iliaj amikoj che la fejsbuka Amikaro de Pola Radio en Esperanto -la grupo, kiu meminiciate shangis sian nomon al Amikaro de Pola Retradio en Esperanto enteprenis klopodojn, ke pli ol pli ol jarcent¬duona tradicio de la parola E-komunumo, kreiginta chirkau la varsoviaj E-programoj ne malaperu.

Jam meze de februaro che la adreso de Pola Retradio en Esperanto

(http://retradio.posterous.com/) aperis la son¬dokumentoj registritaj komence de tiu chi monato dum la Interlingvistika Sesio en Adam Mickiewicz-Universitato en Poznano.

Ekde la 21-a de marto startis eksperimente la regulaj E-programoj de la Pola Retradio en Esperanto audigantaj lunde kaj vendrede. La eksperimento konsistas en tio, ke tiuj programoj – pretigataj de la nunaj kaj eksaj redaktoroj -startas de preskau nula financa bazo. Ni tamen entreprenas chi tiun provon pro insistaj petoj de la gisnunaj geauskultantoj, kiuj ne sole rekonas la parol¬kulturan signifon de niaj programoj, sed ankau rimarkis en ili instruan kaj klerigan valorojn. Ni kredas, ke ne mankos subtenantoj kaj sponsoroj !

Gojige estas konstati, ke la nunan eksperimenton, senhezite decidis daurigi Barbara, Gabi kaj Maciek. Sian kontribu¬emon deklaris ankau iom malnovaj gekolegoj: Andreo Pettyn, Milada Szwedo, Wojtek Usakiewicz. En Varsovio ne mankas junaj E-amikoj, ankorau nun virtualaj redaktoroj de nia programo.

Auskultu nin, disvastigu nian programon ! Esprimu viajn opiniojn, rimarkojn kaj suflorojn. Ech per la plej modesta financa kontribuo per la pago: http://retradio.posterous.com subtenu la klopodojn florigi la parolan kulturon de la Ekomunmo.

Nia UEA-konto: vars-t neniam estis blokita kaj atendas vian kontribuemon.

Ne laste ni menciu la nomojn de tiuj, dank’ al kies persisto kaj amikaj klopodoj audigas la programoj de Pola Retradio en Esperanto; Dankon al Salikh Zakirov en Japanio, Bruce Crisp en Kanado kaj Andrzej Bach kaj Edward Wojtakowski en Pollando.

Kompreneble dankon al Boguslavo Ubik-Perski, kiu en Facebook-a portalo establis la grupon de Amikaro de Pola Radio en E-o, nun Amikaro de Pola Retradio en Esperanto !

Danon al chiuj, kiuj ne volis kredi, ke en nia E-komunumo forestos la parola vocho de Varsovio, la naskigurbo de Esperanto !

Plej amike,

Redakcio de la Pola Retradio en Esperanto ! (barbarinella@gmail.com)

u

Chu ne formulo por solida mond-ordo?

Husejn Al-Amily

Kvankam La Okcidento (LO) jam posedas altajn potencojn de jarcentoj da sociaj, politikaj eksperimentoj, spertoj, moderna teknologio, materia progreso, prospero kaj vastega plej influa reto de amas-komunikiloj -al gi, estanta la heredanto de mondaj socioj kaj ties lertajhoj, tamen ankorau mankas la volo antauenigi fidindan ordon, kiu povos gajnigi la homaron de nia mondo kaj resanigi la vundojn de nia komuna hejmlando, chi tiu planedo.

Kial, do, la manko? Mi opinias, ke LO-on, kiu estas la heridanto de la roma kulturo -Romo, kiu multe kaj longe ekspluatis la mondon kaj reen malmulte donis al gi -tiun LO-on nuntempe regas ambiciaj profesiaj politikistoj, kiuj, malgraue de sia aserto, ke ili representas siajn "naciojn", fakte chefe representas la interesojn de siaj triboj au klasoj. Krome, al tiu LO ankorau ne prosperas psike eliri de sia geto de timo de "la alia" -nun

chefe la mondo de Islamo. Oni emas forgesi, ke estanta si mem kombinajho, kaj formita chefe fare, de multaj antauaj maturaj kulturoj, la tiel bunta mozaiko de Islama homara tutkulturo ne povas esti fremda -ne menciiu timiga - al iu ajn alia kulturo. "9/11" kaj "3/11" kaj similaj, dume, estas sovaga ago de kolero de 'varmkapuloj', kiujn inicie provokas insultoj kaj humiligoj fare de LO kontrau Islamo. Ekz-e, LO kreis Israelon (" an outpost in an alien culture" ("fora posteno en fremda kulturo" usona Int. Herlad Tribune) kontrau la volo de la islama mondo videble kun malica intenco, ke tio restu fokuso de malpaco en la regiono, (au chu LO kreis Israelon pro 'promeso' en libro, au pro amo al judoj?! Tiujn judojn nur Islamo protektis tra historio kaj povis denove akcepti kiel refugintoj kaj poste civitanoj same kiel gi akceptis milionojn da armenoj dum la 1-a MM). Oni kreis kaj armigis despotajn regimojn, lanchis instigadon de civilaj militoj (libana, sudana, Algerio, ktp), kaj regionaj militoj [araba-israela, Irak-irana, Irak-kuvajta, ktp], kaj jen nuntempe ech rekta simile detruada okupado de islamaj landoj -Afganio, Irako.

Cetere, kvankam de diversaj kulturoj, tamen Islamo kaj LO estas historiaj partneroj pri konstruo de homara civilizacio. Islamo ankau restas kiel paralelo de Kristanismo kaj do pioniro pri la principo de moraleco pri homa

frateco, justo kaj libereco, kio ofte efektive mankas al LO chefe tra sia historia malpaca konduto. Indviduoj homoj baze ja estas moralemaj, char tio estas la animo, kiun Dio donis al homo, tamen moraleco ofte mankas al la politika konstruo de LO-aj rilatoj inter si mem (ekz-e europo-civilaj senchesaj sangaj konfliktoj ene de gi), ankau chirkau la cetera mondo (konstantaj militado, okupado kaj ekspluado).

Nun ni chiuj dolore rigardas al nia hhaosa sufera mondo, por kiu ni do chiuj deziras solidan mondo-ordon. Jen do 'utopia songo' teme pri tia mondo, kian ni povas ja atingi, en simplaj vortoj, lau mi, pere de la jenaj rimedoj:

(A) Monda senarmigado, kaj abolocio de arm-komercado. Tiuj, kiuj produktas kaj komercas per armoj inkluzive de amas-detruado arm(ADA) estas chefe kelkaj supershtatoj. Dependas do je chi tiuj si moj prikontempli la avantagojn de monda sekureco sen tiuj armoj. Char la mondon nuntempe pleje influas unuobla potenco, nome Usono, monda senarmigado povas esti ech pli facile atingebla celo, SE tiu Usono, la nuntempa kondukanto de potencega LO, konvinkigas pri ties avantagoj.
Tra la monda areno, teorie eblaj rivaloj de LO estas Chinio kaj Japanujo. Kvakam ankorau virtuale milite okupata, Japanujo tamen shajnas esti nune kontenta pri sia rolo kiel ekonomia servisto de LO. Se oni ne provokas gin per chantago (ekz-e ekonomia siego), Chinio ne kutimas pri eksteraj avanturoj. La islama mondo ne strebas al potenca rivaleco kun LO, sed nuntempe al liberigo de ties abomena influo. Se tiuj superpotencoj interkonsentas pri tia senarmigado, la ceteraj landoj shajne pli volonte konformos. Por plenumi tiun 'songon', oni bezonas filozofojn-politikistojn (ne volgaran kvazau-lernejknaban super-shtatestron, ekz-e kel S-ro Busho!)

(B) Sindeteno kauzi malfelichajn statojn por landoj de t.n. "tria mondo" -politikaj, ekonomiaj kaj militaj. Tio povas lau mi okazi lau jenaj rimedoj:
(a) Sindeteno de perfortigo de despotaj regimoj al tuj landoj -t.e. ne armigu kaj instigu ilin militi unuj kontrau la aliaj (Irako-Irano, Irako-Kuvajto).
(b) Komerci kun tiuj landoj nur per mashinoj kaj materioj por civilaj industrioj kaj simile utilaj varoj, kiuj mankas al ili.

(c) Konsilo kun helpo al tiuj landoj pri plibonigado de siaj vivo-niveloj kaj eduk-nivelo, kaj aparte pri famili-planado.

(C) Naturaj rimedoj de la Terglobo estas Dio-donaco por chiuj homoj. Akvo, nafto, amas-nitrajh-kultivaj kampoj kaj pluv-arbaroj, same kiel potenco-rimedoj civilaj kaj sociaj utiloj kiel naturaj mineraloj kaj moderna nuklea teknologio kaj similaj -chiuj chi generale devas esti tauge administrataj lau internaciaj traktoj tielmaniere ke iliaj utiloj devas esti haveblaj al chiuj, chiu proporcie lau propra bezono kaj kontrau negoceblaj justaj kondichoj.

(D) Cetere, shango de multe da pezaj industrioj ekz-e de arm-produktado kaj stratautoj al utilaj civilaj mashinj, (ekz-e agrkulturaj trakturoj, shipoj, uzinoj, ktp por la t.n. tria mondo) ne povas okazi sen longdaura planado kaj esplorado de sociaj kaj politkaj sekvaj rezultoj. Tio tamen estas nevitebla kondicho de perspektivo de monda paco. Komuna planado fare de tiuj super-shtatoj de lau-grada shango de multe da ties tiaj indusrioj tiel ke ili chefe servu al civilaj celoj, shparu mondajn richajhojn, kiujn oni pro tiuj industrioj nuntempe malshparas, kaj antauenigu medio-amikajn sociajn kaj industriajn politikojn - chio de tiuj estas la nepra devo de la nuntempa homaro. La evoluigita Okcidento povas tielmaniere ankorau teni la nivelon de siaj civilizacio, avantagoj kaj favora viv-maniero dum mil jaroj en pli sekura mondo. Dume, gi povos tiam plue oferti multe da sia teknologia supereco, bonaj sociaj sistemoj kaj kulturo al la cetera mondo -supozeble neniam kontrau malpli da gajno. Tio ankau, por, ke ADA (la amas-detruad-armoj), unue kreita fare de LO, ne estu relanchota de la anguloj de la senigatoj kaj mizeruloj de la mondo.

(E) La klimata shango farigas tuja kauzo de geno, ech de dangero kontrau, la vivo si mem sur nia planedo Scienistoj jam distingas tiun dangeron, avertas nin pri gi kaj sugestas definitajn nrimedojn por eviti la katastrofon; (jen la japana tsunamo de hondiau 11-03-011). Politikistoj de chiuj nacioj de la mondo devas rekonti tiun dangeron, kunveni regule kaj fari devigajn legojn por kontraubatali la nepre alie atandatajn difektoj de la klimata shango kontrau naturo kaj chi ties vivo.

(F) Oni devas plibonigi la staton de la Organizajho de La Unuigantaj Nacioj, (UN), ekz-e pere de permeso pri maljeso ('veto')-rajto por naci-grupoj kiel La Araba Ligo (de 24 nacioj), tiu de la hinda subkontinento kaj tiu de Latin-Amerika nacia bloko kaj Slavnacioj. Oni devas ankau plifortigi UN-on pere de pli da potenco por trakti mondajn

problemojn, kun propra pac-konserva armeo funkcii chirkau konflikt-areaoj. Nepre, UN devas firme posedi propran fonton da suficha fonduso por resti solida, forta, sendependa kaj neutrala inter siaj membroj. Gi devas eventuale evoluiadi kiel efektiva mond-registaro kun la nursola tribunalo de internaciaj aferoj.

(G) Antauenigado de kulturaj intershangoj inter nacioj. Kultura alirado ja certe pleje taugas por konduki al pli bonaj kompreno kaj pacemaj rilatoj inter popoloj. Tamen estas chirkau 6000 vivaj lingvoj parolataj chirkru la mondo, kaj tio restas grandega malhelpilo por tiu celo. Iu maniero venki tiun gravan obstaklon estas proponi la facile lerneblan Internacian Lingvon, Esperanto, al nacioj de la mondo kiel komuna dua interkomprenilo por chiuj. (Esperanto estis rekonata kaj laudata unue fare de La Ligo de Nacioj en 1932, poste fare UNESKO de UN je 1954 kaj 1985.)

Fine, tamen ne malpli grava. Jen gravega averto! Ekz-e, al nuntempa franca filozofo, LO-a civilizacio aspektas same kiel veturilo, kies shoforo kondukas gin tro rapide por bremsi antau granda roko, kiun li jam vidas antaue de li sur la shoseo! Oni scivolemas chu tiuj poltikistoj povus sage permesi al si la imagon kaj bonvolon (unue, tamen, la nepran intereson) eventuale servi siajn landojn kaj la reston de la mondo -fakte la tutan estonton de la homaro sur chi tiu endangerigata Terglobo? Chu ili povus akcepti kaj evoluigadi tian au similan mondo-ordon, kiu lau mia modesta opinio neniam estas preter la povo de La Okcidento.

Oni povas nomi gin utopio au iluzia songo, tamen mi kredas, ke ni daves atentigi homojn, ke chi ties best-speco, kies potenco nuntempe vagas en la suprajn profundojn de la universo ne povas esti malkapabla au ne meritinda je paco malsupre chie tie sur sia Terglobo.

Scivoleme

Husejn Al-Amily

P.S. La autoro de chi tiu ‘utopiajho’ bonvenigos eblajn komentojn

Xhelal Zenejli

Albanaj zorgoj en la nuntempa Makedonio

Oni ne rekonis albanojn kiel nacion dum la Versaja Jugoslavio. Sed ankau

post 1945 la eksa Ligo de Komunistoj de Jugoslavio de Tito dare ne agnoskis la statformigan rolon de albanoj entute, kvankam gi propgandis impertinente pri egaleco de la popoloj kaj nacioj.

En Makedonio slavomakedonoj ekde 1991, estas heredintaj kolonialisman statuson koncerne albanojn, kvankam mem ili estis ia kolonio serba au slavoserba. La sola sangigo en ilia sinteno al albanoj estis la jena: Dum la monisma Jugoslavio albanoj estis subpremita popolo, sed nun en pluralismo ili estas popolo je duaranga, tio estas malplimulto. Sed per la konstitucio de Kiro Gligorov la statuso de albanoj estis malplialta ol per Kosntitucio jugoslava de la jaro 1974.

La registaro de Lubco Georgievski kaj sia partio VMRO ekzercis al albanoj subpreman, diskriminaciigan kaj restriktigan politikon, nenion farante por korekti la maljustajojn de la pasinto.

La albana afero notis plibonigojn nur dum la periodo 2002-2005, tio estas post la ribelo albana de la jaro 2001. Post kiam la statpotencon rekaptis VMRO kun Nikola Gruevski denove la afero de albanoj neglegtigis. Alivorte gi dum lastaj du jardekoj kunfrapigis inter Skilo kaj Haribdo.

Fakte la albana afero estus solvenda kiel historia interkonsento de du popoloj. Oni bone scias ke sen albanoj Makedonio ne plu povas stari kiel staton. Suficas ke albanoj ne partoprenu la registaron kaj gi enfalas.

Hodiau

estas eble ke oni solvu juste la aferon envorte car:

-La albana faktoro en Makedonio estas notinta dinamikan evoluigon en pluraj kampoj politika, ekonomio-socia kaj kultura.

-Gi estas travivinta altan gradon de la nacia konsciigo.

-Albanoj sin montris tre maturaj, prudentaj ankau
dum fortaj turbulecoj okazintaj
dum lastaj 20 jaroj.

-La albana afero tie estas jam emancipita, konfirmita, aktualigita kaj internaciigita.

-Albanoj ne plu povas atendi por ke ilia afero solvigu.

-Etnoalbanoj kaj slavomakedonoj estas jam adaptitaj sufice bone unu al la alia.

-La postuloj de albanoj estas ne ekstremismaj kaj radikalismaj, sed realaj kaj raciaj. La agnosko de la statuso de popolo statformiga por albanoj kaj la fondo de Makedonio duenta ne diskutas la internaciajn ties limojn.

-La definitiva solvo de la albana afero en Makedonio estus ia testo pri gia demokratieco. Tio interesigas ne nur albanojn, sed ankau
mem slavomakedonojn. Gi
helpas al stabileco de Makedonio kaj regiono. Tiel gi povus adhere pli facile al NATO-o kaj EU.

Estante dimension de la tutnacia afero la bona solvo de afero albana en Makedonio havus tutnacian gravecon. Gi plue faktorigus albanojn en Balkanio kaj savus la politikan ekvilibron tie.

Albanoj notinde kontribuis en la enfalon de miniimperio de Jugoslavio, ili ludis graven rolon por forigi Rusion disde Balkanio.

Post disfalo de Jugoslavio plurestis tri debulaj statoj: Bosnio kaj Hercegovinio, Montenegro kaj Makedonio, pro diversaj historiaj, etnaj, kulturaj, lingvaj kaj religiaj kialoj.

En BkH ekzemple serboj kaj kroatoj kontestas la identecon de musulmanoj, kiuj siavice sin nomas bosnianoj kaj parolas la bosnan lingvon. Lau
serboj kaj kroatoj bosnianoj estas
serboj au

kroatoj islamigitaj dum ilia lingvo estas ia serba au
kroata sargite per turkismoj,
arabismoj kaj persismoj.

Koncerne la montenegranojn, lau
serbaj nacionalistoj, ili ne konsistigas apartan
nacion. Ili estas serboj kaj parolas serban dialekton. Kiam Milo Gukanovic
proklamis
referendumom pri la sendependeco de Montenegro, estis la albanaj vocdonoj kiuj disigis
tiun landon disde Serbio. Alivorte la montenegrana socio estas dividita en nacionalistaj
montenegranoj kaj en serboj au
serbemeuloj.

Slavomakedonoj neigas far de bulgaroj, same de serboj kaj grekoj. Ili dividigas
en serbemaj kaj bulgaremaj.

Serbio influas notinte en ciuj supre tri statoj.

Dume Kosovo ne apartenas al la landoj je debula stabileco car ties logantaro
konsistas je 90 % el etnaj albanoj, kiuj estas sufice kapablaj por statformigo.

Ciuj kvar statoj trapasis la fazon de la milito. En Makedonio post la milito de
2001 oakzis la Interkonsento de Ohrid, sed gi ankoraxu ne estas gisaplikita. Kial do?

Car oni ne respektis la limdatojn antauviditaj.

-Gi ne plenumigis komplete kaj gisfine.

-Gi estis interpretita unuflanke

-Oni misprezentis ties enhavon.;

-Oni misinterpretis gin;

-Praktike oni ne aplikis gin guste;

-Gi travivis kaj konis kompromisojn;

La slavomakedonoj kvankam signis gin neniam rekonis gin

Kial oni ne akceptu almenau
la rajton de albanoj por esti nacion kajMakedonion
dunacian?

La internacia faktoro ebligis la starigon de du serbaj statoj en Balkanio (Serbio kaj Republika Srbska), kial oni ne fondu tri statojn albanajn: Albanio, Kosovo kaj Dunacia Makedonio. Oni bone scias ke albanoj estas praa popolo, autoktoneca en Balkanio. Car oni ne ebligas la formigon de unusola albana stato, tiam oni ebligu ke albanoj fondu siajn statojn.

Svisio prezentas bonan modelon de stato el tri statformigaj popoloj. (germanoj 65 %, francoj 18.4%, italoj 9.8%). Gia federacia strukturo bone funkcias. Ekzistas ankau retoromanoj au
romansoj 0.8%. Oni estas oficialiginta kvar lingvojn. Laureligie ekzistas
tri konfesioj: katolikoj 48%, protestantoj 44 %, hebreoj 03% (lau

la donitajoj de la jaro
2005).

Belgio reprezentas alian modelon, kiu post la jaro 1993 farigis federacia stato el flamanoj, valonoj kaj germano-parolantoj en tri regionoj: Flandrio, Valonio kaj cefurbo Brukselo. (flamanoj 56.3%, valonoj 32% kaj germanoj0.6 %, hebreoj 0.3 % (lau la donitajoj el la jaro 1977)

Ciuj tri lingvoj estas oficialaj..La preso, edukado, radio kaj aliaj amaskomunikiloj uzas du lingvojn flandran kaj francan.

La manko de la solvo por la albana afero en Makedonio povus instigi la nacionalismajn fortojn albanajn revigligi, tiel malstabiligante mem la staton. Tio povus inciti ankau la serbemojn kaj bulgaremojn starigi evidentante la krizon de identeco de la slavomakedonoj. Povus aktivigi la fortoj garasaniismaj kaj sanktostefanismaj (komprenu: serbema kaj bulgarema).

Lastatempe la klopodoj de albanoj por solvi sian aferon similas al gandismo. Sed tio ne estas nur kultura afero, fakte gi estas afero de okupita teritorio, subpremita popolo, eskpluatita, translokigita, malkulturita, margenizita kaj getoizita ekde la jaro 1912 gis nuntempe.

Do la solvo de la albana afero en Makedonio subkomprenas:

La fondon de federacia Makedonio

-Agnoskon de la albana nacio en Makedonio

-La fondon de dunacia Makedonio

-La kreigon de du enta Makedonio

-La rajton de la albana popolo pri sindeterminado

Noto: Ci artikolo kauzis debaton inter Viktor Galeski el Prilep (Makedonio) kaj Bardhyl Selimi (Tirana, Albanio)

Debato:

Estimata s-ro Selimi kaj aliaj prizorgantoj pri la nuna politika kaj viva situacio en Makedonio.

Delonge mi tralegis viajn skribajojn kaj zorgojn pri la albana popolo en Makedonio kaj Kosovo. Bedaurinde mi devis tralegi artikolon de iu s-ro Gelal Zenejli, kiu ploris pri la albanoj en Makedonio kaj iliaj rajtoj. Bone li enmetis foton de nova moskeo en Tetovo. Li povis enmeti fotojn de preskau
300 novaj moskeoj
tra Makedonio kaj kompari kun nombro da moskeoj en Albanio – kaj samtempe skribi kun rajtoj de la makedonoj kiu logas en la regiono de Prespa – Golo brdo, Pustec kaj aliaj regionoj … kaj konstati, ke kompare kun “diskriminitaj “ albanoj en Makedonio kiu povas lerni en bazlernejoj, mezlernejoj kaj fakultatoj en sia

nacia lingvo albana – tion makedonoj en Albanio ne povas fari nek en bazaj nek en mezaj lernejoj. Lerni makedone en fakultatoj tra la albanio estas sciencfantastiko. Sed makedonoj kiuj estas parto de Albanio neniom ribelis kaj kun pafiloj atakis kontrau
sia stato por siaj rajtoj.

Kompare kun albanoj en Makedonio kiuj detruis kirkojn kaj sakralobjektojn tra la tuta Makedonio, plejparte en okcidenta Makedonio, neniu el albanaj moskeoj (konstruitaj plejparte sen permeso kaj konstrua dokumentacio) estas detruitaj. Post la milito kuon vi volas alvoki ribelo en 2001 jaro, multe da monumentoj dedicitaj al eltomigitaj albanoj tra nokte estis konstruitaj tra Makedonio (preskauciuj sen permeso de la stataj ministarioj) kaj denove neniu de ili estas detruitaj – kompare, monumento de 10 mortintaj soldatoj de makedona armeo kiuj estis mortigitaj en unu tago ce la loko Karpalak gis nun estas detruita de la albanoj pli ol 10 foje – preskauci jare.

Mi ne povas kompreni pri kiuj rajtoj au
malrajtoj vi denove kaj denove
klopodas. Pro kio dum la milito en Serbio fratoj albanoj ne gastumis en Albanio ce zorgantaj fratoj, sed pli ol 300.000 logantoj el Kosovo venis en Makedonio kaj estis bone akceptitaj. Cu via memoro estas selektita? Vi skribis slavomakedonoj

– kion gi signifas, se vi pensas pri makedonoj kiuj estas ortodoksaj kaj vivas en Makedonio, pro kio vi ne skribis albanmakedonoj – eble tio signifus albanoj kiuj vivas en Makedonio.

Mi estas laca batali kun vortoj kaj faktoj kun albanoj zorgantoj pri la

albanoj en Makedonio. Mi lernis en Struga, kaj mi ciam estis bonkore alvokita de

albanoj logantoj en Struga, kaj nia interkompreno kaj ambaua vivo neniom estis parto de la scienca prizorgado de la “scienculoj” far de Makedonio. Vi skribis ke Ohrida kontrakto post la milito en 2001 j. gis nun ne estas tute aplikita, kial do? Eble pro la makedonoj kiuj kiel parto de tiu kontrakto ne povas reveni en siaj domoj kaj devas logi en studentdomoj kaj aliaj lokoj – kompare kun albanoj kiuj jam revenis en siaj domoj.

Vi denove songas pri granda Albanio – konstruita de partoj en Makedonio, Kosovo kaj Albanio. Samtempe vi skribas pri homaj rajtoj, kaj europa identiteco. Strange ... Vi komparis Makedonion kun Svislando ... ne forgesu, ke kiam Svislando estis konstruita en tiu parto ekzistis urboj – feudalaj statoj, ne stato kiuj poste unuigis kaj fondis novan staton Svislandon. Nun vi volas realan staton distranci al feudoj lau
ekzemplo de Svislando. Ho ve, kian historion vi lernis en
viaj lernejoj. Krom albanoj en Albanio logas makedonoj kaj grekoj, pro kio vi ne montris al la mondo kiamaniere povus Albanio funkcii kiel moderna Svislando.

Vi skribis ... ke albanoj estis getoizitaj en Makedonio, bedaurinde mi devas konkludi kun vi – jes albanoj en Makedonio estas getoizitaj, car plejgranda parto de ili ne scipovas makedonan lingvon – oficiala lingvo de la stato kie ili vivas, kaj ni aliaj ne povas kompreni kun ili. Pri kiu gandismo vi parolas ... eble vi miksas pacieca ideo de Gandi kun bataloj kun pafiloj ciam kiam aliaj ne pensas kiel vi. Albanoj en Makedonio, ne forgesu – povas lerni en sia lingvo de bazaj lernejoj gis fakultatoj (en Makedonio ekzistas tri fakultatoj kie albanoj lernas en albana lingvo), povas labori en ciuj laborlokoj lau

sia klerigo kaj plus povas labori kiel

parto de Ohrida kontrakto – sen limoj cu ili havas klerigon por tiu loko au

ne.

(ekz. en mia urbo Prilep de kiam mi scias kaj lau

la skriboj de konataj

vojagverkistoj Hagikalfa kaj aliaj neniam vivis albanoj – nun en mia urbo laboras

oficistoj, policistoj kaj aliaj albanoj lau

Ohrida kontrakto ... montru al mi similan

ekz. en Albanio), albanoj ceestas en la laboro de la stata estraro kiel partnoroj au

kiel opozicio sen problemoj – libere elektitaj, libere konfesas sian religion en iu

ajn parto de Makedonio. Do, kion parton de supere skribitan vi ne komprenas?

Antau

kelkaj jaroj en la centro de Skopje sefurbo de Makedonio estis

konstruita busto de Skenderbeg – popolheroo de albanoj, sen probleme. Kiam

pasintjare en la centro de Skopje estis denove konstruita malnova moskeo, sed

sen bezonataj permesoj kaj konstruplanoj nenio de makedonoj detruis gin. Kiam

en la historia loko de Kale en Skopje makedona stato komencis kun la

konstruado de la muzeo – kiu similas al ortodoksa kirko, civilizitaj albanoj detruis

gin nokte – sen problemo kaj iuaj reperkusoj kontrau

ili. Pri kia kulturo kaj

civilizacio vi skribis. Provu similan fari iu ajn en Europa unio auce viaj najbaroj

Grekoj.

En via lasta parto vi bone skribis jaron de la ekzisto de Albanio kiel stato

1912 kaj poste ordonis multe da regulojn lau

kiuj albanoj devas vivi en

Makedonio. Kelkfoje gis nun mi povis tralegi pri la albanoj en eks Jugoslavio,

Makedonio kaj Kosovo, sed neniam gis nun mi tralegis ion pri la minoratoj en

Albanio – cu ekzistas au

ne, kaj kiuj rajtoj oni havas en Albanio. Estas bone

tralegi kaj kompari tion. Ne forgesu ke en via demokratia stato en lasta registaro

ne estas parto por skribi sian naciecon, cu ce vi kiel en tempo de Enver Hoga

kiam en la balotoj elektis po 101% vivas nur albanoj? – eble 101% pura nacia

lando, tion ni ne povis pripensi de 1945 jaro post la stultaj ideoj de Hitler. Ne forgesu ke Respublika Srpska estas parto de Bosnio nek estas parto de Serbio nek estas federacio kun Serbio kaj fine, ne estas agnoskita kiel aparta stato en eks Jugoslavio kiel ekz Kosovo.

En Bosnio same logas kaj vivas tri diferencaj popoloj, sed Bosnio ne estas distrancita inter serboj, kroatoj kaj bosnianoj. Tiaj ideoj estas tre dangeraj por ni ciuj.

Pripensoj pri Granda Albanio estas stultaj kaj dangeraj. En sama teksto vi skribis pri Svislando kaj Belgio kiel ekzemploj pri la homaj rajtoj kaj samtempe songas pri granda Albanio. Pro kio italoj kaj germanoj en Svislanod ne batalis (lau
vi ne ribelis) kontraustato Svislando sercante unuigo kun siaj bazaj statoj
Italio kaj Germanio. Cu ili ne estas sufice klerigitaj kiel albanoj en Makedonio ke kun pafilo cio estas eble, au
vivas lau
ideoj por komuna vivo kun aliaj popoloj, lau
la reguloj de Europa unio.

Do, dank' al al zorgemaj fratoj de nia najbara lando de tempo al tempo
eble ni havas problemojn kun parto de albanoj (plejparte kun politikistoj), sed ni en Makedonio scias valoroj de komuna vivo kun ciuj etnaj kaj religiaj konfesoj.

Sincere

Viktor Galeski

Reago de Bardhyl kaj komento de Viktor

Moskeoj

B: Moskeoj estas io tute normala en Okcidenta Makedonio kie logas albanoj plejmulte islamreligiaj. Se ciu vilago ilia havu unu moskeon tiam 300 ne estas tro.. Same kiel la ortodoksaj pregejoj en la cetera landoparto. En Albanio ekzistas kvar eklezioj: islama, ortodoksa, katolika, bektasia, tamen estas sufice multe ankau

moskeoj, pli ol Makedonio versajne. Cetere en Makedonio oni estas konstruinte pregejojn ec

en regionoj kie apenau

logas slavomakedonoj. Ekz. sur

Vodna en Skopje oni starigis Grandegan Krucon lumigite dumnokte kvankam cirkaue ciuj vilagoj estas albanaj. Lastatempe la registaro intencas starigi plian pregejon ortodoksan ankau

en la korto de la kastelo de Skopje kontrau

la fakto

ke kiel UNESCO trezorajon oni ne permesas konstrui tie nek islaman nek ortodoksan pregejon.

V: Do, mi ne scias de kie vi ricevis informon pri la pregejo en Kastelo en Skopje – eble de viaj samideanoj kiuj nokte detruis gin (kulture kaj

civilizacie). Fakte temas pri la muzeo, en kiu devas enmetitaj ciuj esploroj de tiu loko en kiu miksas civilizacioj. Vere lau arhitekturo tiu muzeo similas al ortodoksa kirko – sed fakte ne estas sakrala objekto. Samtempe en la centroparto en malnova komerckvartalo de Skopje, sen permeso de la stataj ministarioj, arheologiaj instancoj estis nove konstruita moskeo sur la fundamentoj de malnova moskeo – samtempe damagi najbaraj arkeologiaj

objektoj – sed neniu de “slavamakedonoj” ne atakis kaj ne detruis gin. Pri kiuj rajtoj vi parolis – rajtoj de pafiloj kaj perforto?

La homrajtoj de makedonoj en Albanio

B: En orienta parto de Albanio, nome ceborde de la lago de Prespa kaj aliloke logas kelkmiloj da slavmakedeonoj (6000) tute harmonie kaj plenrajte kiel etnoalbanoj. Ili havas siajn bazlernejojn kaj mezlernejojn en la propra lingvo, siajn asociojn kaj aktive partoprenas la politikan kaj socian vivon de la lando. Mi persone konas plurajn el ili, inter kiuj unu dekanon de Fakultato de Historio. Similan staton guas ankau aliaj minoritatoj el kiuj grekoj pli granda sed kiuj entute konsistigas nur 3 % de la logantaro. Mi verkis artikolojn pri tiu temo en La Gazeto kaj Etnismo kies kopiojn mi povas sendi vin.

V: Eble vi pravas, nelonge antau kelkaj jaroj mi kune kun mia patro vizitis tiun regionon kaj donacis persone pli ol 300 librojn en makedona linvo. Kaj same kiel vi povis vidi en kiuj vivniveloj logas makedonoj (pardonu “slavokamedonoj’) tie. Sen hospitalo, lerni povas makedone nur en bazaj lernejoj, … jes havas rajton partopreni en elektoj kaj doni sian vocon por unu el albanaj partioj sed samtempe ne povas elskribi sin dum la registaro kiel makedonoj. Simile al “makedonalbanoj” en Makedonio, kiuj povas lerni en ciuj niveloj en la klerigo en sia albana lingvo, partopreni en politika vivo, labori kaj vivi en ricaj domoj sen problemo.

Ribelo de 2001 kaj la homrajtoj de albanoj

B: La ribelo de 2001 okazis guste pro diskriminaciita pozicio de albanoj en Makedonio. Tiam la registaro bombardis la albanajn vilagojn kie enestis tutaj familioj per artilerio kaj helikopteroj luitaj de Ukrainio kaj aliaj “frataj” landoj slavaj. Mortis multaj homoj kaj nature postmilite albanoj rememorigis ilin per monumentoj. Ankau slavomakedonoj starigu tiajn monumentojn al tiuj nur dek falintoj iliaj. Tio estas la malplejmulto farenda.
La terminon slavomakedonoj mi uzas por distingi ilin de grekomakedonoj, turkomakedonoj au serbomakedonoj.

V: Eble vi miksas kronologion de la komenco kaj dauro de la milito en Makedonio, sed denove lau viaj ekscioj. Unue albanaj ribeluloj kiuj logas en Makedonio, fakte makedonalbanoj subtenitaj de kosovalbanoj atakis al nia armeo kaj policio kaj murdigis kelkdekoj de la soldatoj kiuj gis tiam neniam nek atakis nek batalis kontrau logantaro de tiu parto en Makedonio.
Kiam tiamaj ribeluloj (nun parto de la Stataj organizoj, parlamento kaj sen probleme partoprenas en politika vivo kiel pozicio au opozicio) venis en Aracinovo kiu estas parto de Skopje, tiam nia Armeo atakis kontrau ilin

defendante la staton an kiu apartenas. Cu nelonge en Tirano policio ne

atakis kontrau

albanoj – kiuj eble estas ribeluloj kiuj demonstraciis por la

diskriminaciita pozicio en Albanio. Vi diris, “nur dek falintoj iliaj” – jes dek falintoj en unu tago, el unu urbo, mia naskigurbo Prilep, mortigintaj en embusko ce la loko « Karpalak ». (Ciu vivo estas sankta sed vi diras nur dek falintoj – kiel neserioze.) Samtempe makedonalbanoj kaj fratoj kosovalbanoj havis subtenon de NATO kaj fratoj amerikanoj, li ricevis armilojn kaj instruistojn kiel batali kaj kiamaniere mortigi la soldatojn de regula armeo en unu stato. Vi volas diri ribelo, lau

mi estas milito car fratoj

kosovalbanoj atakis de Kosovo en Makedonio, lau

militklerigo tio estas

agresio kaj milito – sed ne grave, grave ke multe da homoj mortigis pro iuj ideoj kaj pro tio ke tiamaj komandantoj nun estas malgraucefaj politikistoj en Makedonio. Imagu, ke Obama alvokis Bin Laden kiel vicministro por la milito en USONa stato. Bedaurinde tio povas esti nur en Makedonio.

Preskau

en ciu vilago en parto de Makedonio kie logas albanoj estis

konstriutaj monumentoj al ribeluloj kiuj atakis kontrau

sia stato. Busto en

loko “Karpalak” gis nun estis 10 foje detruita, se vi volas esti respektita de mi – respektu min. VI nenion respondis pri la slavomakedonoj kiuj ne povas reveni hejmen en vilagoj de kie rifugis antau

ribeluloj

albanmakedonoj kiuj detruis iliajn domojn – kiu estas parto de Ohrida interkonsento. Cu vi ne havas sufice da informojn pri tio, au

ne volas

auskulti pri aferoj kiuj ne interesigas vin au

ne placas al vi?

Kiuj estas la homrajtoj?

B: Unue, la rajto uzi patrinan lingvon en la stataj oficejoj. La interkonsento de Ohrid antauvidas ke la albana estu oficiala en la loglokoj kie albanoj estas plimulto. Sed tio ankorau

ne estas realigebla. Mia persona sperto: Kiam mi eniris

busstacion en Tetovo logata plejmulte de albanoj kaj petis bileton la slavmakedonino dejoranta respondis makedone. Kial vi ne parolas albane mi diris. Ci tie logas plejmulte albanoj? Tiel vi diras sed ne ni-respondis si arogantece.

Same en Skopje kie logas pli ol 200 000 albanoj en postoficejo, busstacio kaj alie mi ne povas komuniki albane car ciuj dungitoj estas slavmakedonoj.

Due, la dungigo en la stataj institucoj. La interkonsento de Ohrid antauvidas ke albanoj dungigu proporcie al ilia nombro, kiu lau

statistike estas ne

malpli ol 32 %. Sed ankorau

tio ne estas realigita. Miaj kuzoj logas en

Makedonio. Unu el ili, universitata diplomito estis nomumita kiel 1200 aliaj albanoj en stataj oficejoj. Sed ekde 18 monatoj li plurestas hejme ricevante salajron sed ne invitite ekokupi sian sidlokon en oficejo.Kial? Car la slavomakedonaj autoritatoj ne volas kunlabori, kunregi kun albanoj..

Mi audis de iu albano de Gostivar reveninta el Italio post longjara rifugado

tie ke malgrau

liaj klopodoj investi en sia urbo malfermante novan bizneson la

autoritatoj slavmakedonaj malhelpis lin ciamaniere.

V: Same en tiu parto de via respondo vi pravas. Sed de kie komenci?

... Mi ne scias kiam vi vizitis Tetovo, sed mi scias ke de 1988 kiam mi

kelkfoje tra Tetovo iris en Kosovo mi havis problemon por aceti buleton en

busstacio, car la dejoranto estis albano – kaj proponis al mi lerni albanan

au

iri piedire gis sercata loko. Sed eble ni havis miskorektan personon kiel

dejoranto. Samtempe mi en Prilep havas kelk da oficistoj albanoj kiuj

laboras lau

Ohrida interkonsento – sed, malmulte au

ne komprenas

makedonan lingvon, en Prilep ne logas albanoj – kaj ni havas problemon se

ni atendas antau

ilia saltero. Kial? Makedonalbano en lando kie vivas, kie

oficiala lingvo estas makedona nekomprenas makedonan lingvon – kiu

konstruas murojn kaj getozizacion. Brave, vi bone rimarkis ke albanoj kiuj

lau

Ohrida interkonsento plejparte laboras en stata administracio ofte ne

laboras sed pro tio ricevas altaj salajroj. Samtempe ni "slavomakedonoj"

ofte senlaboro atendas ricevi laboron austatan subtenon. Cu tio ne similas

al subteno kiu ricevas grekoalbanoj en Albanio? Slavomakedonoj por

surskribi en la fakultatoj devas unue havi bonan sukceson trala tutaj kvar

jaroj en mezlernejo, poste ekzameni ekzamenon, kaj se havas sufice da

poentojn lau

limoj da fakultatoj eble povus lerni en tiu fakultato. Samtempe

iliaj samaguloj albanoj malgrau

havas malplialtan sukceson dum kvar jaroj

en mezlernejo kaj malgrau

ne ciam povis sukcese fari ekzamenon havas

garantian percenton de preskau

25% kaj senprobleme komencas sian

studadon. Pardonu min en kiu lando tio ekzistas, kaj ne parolu min pri

Ohrida interkonsento car citio estis kaj ekzistis de tempo kiam mi studis en

1988 jaro.

La kulturo, edukado, scienco

B:Ankorau

en la oficialaj lernolibroj, enciklopedioj retpagoj de Makedonio

albanoj prezentigas humile, sen historia tradicio, ec

kiel venigitaj tien de turkoj!

Ni rememoru la falsajojn evidentigitajn en la lasta versio de la Makedona

Enciklopedio. Albanoj estas autoktona popolo en Makedonio kies spuroj devenas

el pratempo, tion ne volas akcepti nunaj slavomakedonoj!

Albanaj universitatoj, cefe privataj, estis forte malhelpitaj de registaro (ni

menciu la universitaton de Tetovo) malagnoskante ties diplomojn kaj per multaj

aliaj rimedoj kaj manieroj.

La historio de albanoj ne speguligas en la oficialaj lernolibroj, kontraue tio

estas prezentita malprave.

Busto de Skanderbeg en Skopje estas tute normala car albanoj en tiu

urbo estas pli ol 200 000 kaj Skopje estas forte ligita al la historio praa kaj

moderna de albanoj (inkluzive periodon de Skanderbeg kaj de la ribeloj kontrauosmanaj. Cetere busto de Skanderbeg estas starigite same per mono de la popolo, ne de la stato ankau en Diber (Debar) kun kiu loko estas forte ligita la deveno de Skanderbeg mem.

En Skopje estas starigite busto kaj rememorigejo ankau pri plej fama albana virino enmonde, Gonxhe Bojaxhi-Patrino Tereza kio honorigas la makedonan registaron.

Albanoj estas gastamaj. Tradicie ilia hejmo estas la “hejmo de Dio kaj la gasto” kiu povas esti ankau nealbano. Ili neniam ekzercis ian pogromon fasisman kiel tio okazis iamtempe en Manastir (Bitole) logata plejparte de albanoj, centro

de unu el kvar provincoj (vilajetoj) albanaj, sed bedaurinde nun malplenigite de albanoj. Mi audis ankau
pri fojfojaj perfortajoj ekzercitaj en Skopje kontrau
albanaj gestudentoj kaj civiluloj far de certaj grupoj sovinismaj slavmakedonaj.

Vi mencias la militon de 1999 en Kosovo kaj substrekas la fakton ke Makedonio akceptis 300 000 rifugintojn. Fakte gi faris tion tre heziteme post kiam lasis ilin longajn horojn kaj tagojn ce la landlimo gis kiam la fremdaj autoritatoj premis forte sur gin. Plejmulto gastis ce la hejmoj de albanoj de Makedonio au ne? Parto de tiuj 300 000 estis devigite forflugi gis Australio, dum en Albanio alvenis kaj restis gis la militofino 500 000 rifugintoj!

V: Kiom da universitatoj en Albanio vi havas pri minoritatoj ? Dum la UK 2001 en Zagrebo mi diskutis pri similaj aferoj kun europanoj de EU parlamento, kiuj propanis al ni simile al vi fari Makedonion – Svislando. Kaj doni al albanoj eblecon lerni al ilia albana lingvo de bazlernejoj gis univerzitato – cio en la nomo de demokratio. Lau
mi demokratio egalas por
unu persono kaj por milionoj, demokratio ne konas percentojn. Tiam mi demandis lin cu en Germanio kie logas pli ol 8 milionoj da turkoj, ili povas eblecon lerni turklingve de baza lernejo gis la univerzitato, kaj cu en Germanio ie havas universitato kie turkoj povus lerni turklingve, li kun rideco respondis al mi ke demokratio estis konstruita de la ricaj statoj, sed ne ciam oni bezonas gin. En la 1999 Makedonio estis iamaniere finance elcerpita car en Makedonio venis pli ol 300 rifugantoj kosovalbanoj, vere

plejgrandaparto estis gastoj ce iliaj fratoj makedonalbanoj, sed ciuj ricevis financan subtenon. Kaj fine lau

kiu lego tiam Makedonio devis gastadi

rifugantojn de Kosovo? Humaneco en tiu tempo estas tiel granda inter ciuj logantoj de Makedonio. Tiatempe mi rete ricevis peton en Hispanion, kiamaniere transdoni helpon al albanoj en Kosovo. Car mi ne havas rektaj ligoj mi provis pere de albanaj cefuloj en tiamaj partioj organizi cion, kaj transdoni helpon al logantaro al Kosovo. Cu vi volas tralegi respondon kion mi ricevis de fratoj albanoj – ili proponis al mi, pagi po 200 dolaroj tage por la soforo, po 300 dolarojn tage por la tradukisto kaj post iton ili transdonos helpon al fratoj albanoj en Kosovo. Kiam mi tion trasendis en Hispanio la helpo estis alvokita en Hispanio.

Mi jam diris ke mi lernis en Struga, kaj mi bone scias pri la gastemeco de albanoj, sed albanoj kiuj estas longtempe en tiuj spacoj. Kaj hodiau

mi havas multe da amikoj albanoj kiuj laboras kaj vivas en Makedonio kaj neniam klopodis pri la diskriminacio. Mi kvar jaroj ludis futbalon dum mia studado por la albanaj teamoj kaj konkuris kontrau slavomakedonoj kaj ciam dum tiuj kvar jaroj ni kune venkis. Mi ne havas fobion de albanoj, car miaj amikoj albanoj respektas min kaj mi respektas ilin, iliajn kutimoj kaj vivmaniero. Multfoje mi kune kun ili partoprenis au ceestis al koncertoj de labana muziko au

dancado, kaj miaj amikoj albanoj

– respektas min pro tio.

Modelo de Svislando, Belgio

B : Certe albanoj deziras savi la staton de Makedonio kie ili estu statformiga do guu samajn rajtojn kiel slavomakedonoj. Alie oni povus fondi federacion por kiu modelo de Svislando estas bona. Tute ili ne intencas kunigi al Albanio ausangi la statlimojn. Cetere hodiau
oni ne pensas pri ia Granda
Albanio, kvankam Etna Albanio (teritorioj kie logas albanoj en siaj propraj teroj) estas realajo, esperante aligi al EU kune kun Makedonio, Serbio kaj aliaj landoj. Sendependigo de Albanio kaj la nova censo

B: Albanio sendependigis en la jaro 1912, kvankam stato de Albanio ekzistis dum la tempo de Skanderbeg XV jc kaj ec
pli frue en VIII jc.
Dume Makedonio sendependigis (nome farigis respubliko) nur en la jaro 1945 danke al TITO, kiam albanoj de Kosovo kvankam pli multnombraj ne rajtis havi sian respublikon!

Oni planas arangi novan censon en Albanio kie oni devas noti la naciecon. Sed la nacieco ne povas sangigi lauvole, kiel tion postulas akuale grekoj. El 800 000 ekonomiaj rifuginoj en Grekio pluraj pretas sin deklari greka nur por akiri pension je 400 euroj kontrau
pension je 100 euroj ricevata enlande. Povas okazi
ke ankau
slavomakedonoj akceptu tiun oferton de grekoj..

V: Fakte, stato Albanio estas konstruita helpe de Italio, kaj Albanio

kiel aparta stato kun nomo Albanio neniam antaue ne ekzistas, simile al Grekio kiu antaue estas konata kiel Elada au Makedonio kie multfoje popolo batalis pri sia libereco kontrau turkoj, serboj, germanoj bulgaroj. En la tempo kiam vi parolis pri Skendebreg neniam estis konstruita stato – same kiel en Makedonio dum la regado de Rego Marko, kaj poste dum la tempo de Caro Samoilo, li batalis kaj fakte tiatempe havis regon gis la Beogrado, tra la tuta Bulgario sed la stato kiel Makedonio ne estas. Pro tio forgesu viajn konkludojn ke Albanio ekzistas en la prahistorio kiel stato sed Makedonio estas stato de tempo de Tito. De tempo kiam regas Tito albanoj ricevis autonomion Kosovo kaj partoprenis en la laboro de tiama stato Jugoslavio, tiam multe da respublikoj antauciuo Slovenio kaj Kroatio donacis po 10% de sia jara financa gajno al Kosovo. Fakte eks Jugoslavio distrancis car Slovenio ne volis plu donaci financa helpo al Kosovo, kaj subteni gin. Sed, tio estas alia afero. ... Fine, nenie en historio vi povos trovi ke Aleksandro la Granda estas Greko, kaj ke ili iam esti nomita Aleksandro la Greka – kontraue, li estas konata sub ambau nomoj Aleksandro la Granda, au Aleksandro Makedona. Cu lau viaj konkludoj pri Skender beg kompare Makedonio kiel stato ekzistas antau Kristo – eble vi respondos ne. Kaj ne forgesu, Makedonio estas lando kiu estas menciita en

la Sankta Testamento, longe antau

Tito ekzistas, bedaurinde neniu skribis

slavomakedonoj.

B: La terminon slavomakedonoj mi uzas por distingi ilin de

grekomakedonoj, turkomakedonoj au

serbomakedonoj.

V: Krom makedonoj mi ne scias pri aliaj konstruajoj: kiel

grekomakedonoj, turkomakedonoj au

serbomakedonoj. Mi ne scias kion tio

signifas, eble makedonoj kiuj vivas en Grekio, Serbio kaj Turkio. Turkoj kiu logas en Makedonio senprobleme nomigas sin turkoj, havas eblecon lerni en la turka, partoprenis en politika vivo kun siaj partioj de turkoj. Simila afero estas kun bulgaroj kaj serboj kiuj logas en Makedonio. Malmulte da ortodoksaj makedonoj logas en Turkio, plejparte ili estas muzulmanoj kiuj de Makedonio translokigis en Turkio kaj tie logas. Same kiel en Albanio en Makedonio, krom ortodoksaj makedonoj, ekzistas kaj vivas katolikoj, protestantoj, muzulmanoj – sendepende cu ili estas muzulmanoj kiuj venis kiel konkerantoj kaj restis ci tie au
makedonoj kiuj de orto-doksa konfeso
kaj religio faris sin muzulmanoj en la tempo de turka regado. Cu en Grekio ekzistas grekoalbanoj – kaj kie vi nomigas albanoj en Makedonio – eble ne makedonalbanoj?

Kion mi diras mi ne volas daure diskuti pri la albanaj rajtoj, vivo kaj ilia diskriminacio en Makedonio. Mi simple provis prezenti al vi vivon en Makedonio kie makedonoj kaj albanoj kaj aliaj logantoj sendepende de sia nacieco kaj religio devas vivi kune en la riceco au
malriceco. Pri ni ambau
estas sufice de kvazi zorgantoj kaj fratoj, kiuj subtenas nin ataki unu
kontrau
alia kaj mortigi en la nomo de komuna vivo.

Respektu nin por ke ni povas respekti vin.

Sincere

Viktor Galeski

Xhelal Zejneli

Granda songo de malgranda popolo

La kvazauscienco serba

Por pravigi la serban ideologion de hegemonismo, ekspansionismo kaj koloniismo, la serba kvazauscienco ekmomigis ekde la komencigo de XX jarcento. Unue la akademiaj kaj universitataj cirkloj en Serbio.

Oni komencigis per Mezepoka mito pri la batalo de Kosovo (1389) pro du kialoj:

-Unue, por montri al Europo ke serboj dum ege fora tempo, sinoferante estas defendinte la valorojn de la europa kristaneco, orgojlante pro sia okcidenta idiosinkrazio;

-due, por atesti antau
la kancelerioj de la grandaj historiaj potencoj de nia
kontinento, ke ili ceestis en Kosovo ekde la praa Mezepoko, tial gi (Kosovo)
estas serba, estas lulilo de Serbio, gia animo, sankta serba tero…

Ekmovigis la sciencoj de historio, lingvistiko, etnologio, geografio,
antropologio, geologio, arkeologio. Konstruigis la kvazauscienco serba, kies
laboratorioj transformigis en fabrikojn de kvazauargumentoj.

Dum la jaroj 30 de la XX jarcento, la elito de intelektularo serba arigis en
la Kultura Serba klubo en Belgrado, estrita de teoriulo pri la juro Slobodan
Jovanovic
(Novi Sad 1869-1958 Londono), profesoro pri la Stata Juro en la
Fakultato de Juro en la Universitato de Belgrado.

Konforme al tiu elito de la postrestanta serba skolo, albanoj ne konsistigis
nacion, sed ili estis musulmanoj kaj restajoau
postrestajo turka en Balkanio.

Makedonoj same ne estis nacio. Makedonio reprezentis nur sudan
Serbion. Nek la montenegranoj estis nacio (kvankam ili estis akirinta
sendependecon en la Kongreso de Berlino je 1878), car ilia lingvo estis nur
dialekto de la serba (lau
koncepto: kies estas la lingvo ties estas la tero).

Makedonoj kaj montenegranoj, estante do parto de la serba popolo, ne povis havi siajn religiajn instituciojn. Serboj, montenegranoj kaj makedonoj havus la saman pregejon, samon kleraron kaj samon tombejon kun la serboj. Sekve, lau la principo kies estas la religio, ties estas la tero, ne povus ekzisti montenegrana nacio au makedona nacio.

Bosnio, dume, estis nur geografia termino, tial ne povus ekzisti bosnia nacio, des pli ke la triono de la ties logantaro estis serba. La musulmanoj de Bosnio (ankau de Sandjako) estis nur islamigitaj serboj. En Bosnio logas serba logantaro, dividita en tri eklezioj: ortodoksa, musulmana kaj katolika, samkiel tio okazis ce albanoj.

Koncerne la kroatojn de Kroatio, ankau ili ne posedis klaran identecon, car la parolata lingvo ce ili estis ia dialekto de la serba (ankauci tie validis la principo: kies estas la lingvo ties estas la tero).

Koncerne Vojevodion, Serbio entreprenis rimedojn ke pere de koloniuloj, cefe montenegranoj, sangi la ties etnan strukturon, transformante hungarojn (ankau kroatojn) en malplimulton.

Kiam temas pri germanoj de Vojevodio (cirkau kvarcent miloj) en la jaroj 1944-1945, Serbio sub la akuzo pri kunlaboremo (kolaboracionismo) forpelis ilin ciujn gis la lasta persono el ties teritorioj. (Tutsame kiel agis Grekio kun camoj albanaj junie 1944).

Poste, la historio atestus ke en la granda dilemo inter albanoj kvazau neokcidentemaj kaj serboj kvazau okcidentemaj, senheziteme Okcidento favorus la albanan flankon.

Koncerne la Batalon de Kosovo (1389) la fama diplomato, forpasintaRicard Holbruk deklarus: “Serboj aspiras Kosovon bazite sur delonga milito, kiu neniu scias kiel okazis kaj Dio scias cu envere okazis”. Dume, la sekretario de la stato usona Kondoliza Rajs, pri la sama milito eldirus: “..Serboj parolas pri batalo en la jaro 1389, mi ripetas de la jaro 1389!!!”

La fondigo de la Granda Serbio –

La Granda Serbio fondigixs helpe de siaj aliancanoj-Rusio, Francio kaj Anglio,

en certaj historiaj momentoj, malrespektante tute la historian principon, la etnan principon, la demokratian principon ankau
la principon pri memdecido de la
popoloj.

Malfavore al la albanaj teritorioj, Serbio ekdisvastigis post la turka-rusa milito (1877). En tiu milito, kie Serbio partoprenis ce la flanko de Rusio, Turkio malvenkis. Pro tiu partopreno Serbio rekompencigis per albanaj teritorioj. Sekve komencigis la etna purigado de la albanaj teritorioj de la regiono kie entenigis Nis, Leskovc, Toplica, Prokupla.

Post kiam Turkio forlasis Balkanion (1912), serboj, grekoj, bulgaroj, montenegranoj komencis la okupadon de la teritorioj de unu al la alia, kaj aparte de tiuj albanaj. Serbio, do, dum la unua Balkana milito (1912) plilargigis siajn teritoriojn en la spacoj logataj de neserbaj logantaroj. Sub la serban jugon falis la duono de la albana logantaro kaj teritorio. En la jaro 1913, dum la dua Balkana milito, la balkanaj landoj intermilitis unu kontrau
la alian por disdividi la regionon

nomata Makedonio. Ankau
en ci tiu bellum omniem in omnes, Serbio plilargigis
per teritorioj logataj de neserba logantaro.

Post la turka-rusa milito (1877), post la foriro de Turkio el Balkanio, respektive post la du balkanaj militoj (1912-1913), Serbio plilargigis cefe malfavore al albanaj kaj makedonaj etnaj spacoj. Sub la serban jugon falis albanoj, makedonoj kaj teritorioj je bulgara logantaro. Do, granda Serbio estas ja produkto de la ekspansionisma politiko kaj konkerantaj milititoj de Serbio.

Post la unua mondmilito (1914-1918) kaj fondigo de Versaja Jugoslavio (1919-1920), la proceso de fondigo de la granda Serbio finigis. Serbio dum tiu tempo pretendis ekludi sur la politika scenejo la rolon de ia Piemonto unuigunta en unusolan staton ciujn sudajn slavojn. Tiam sub la serban jugon falis: Montenegro, Bosnio kaj Hercegovinio, musulmanoj de Sandjak, Vojevodio (hungaroj, kroatoj kaj germanoj).

Tio reprezentas versajne unikan kazon en la historio de Europo, ec
de la
mondo, kiam malgranda popolo kiel serboj, akiris tiom grandan teritorian plilargigon.

Serbio tiutempe okupadis teritoriojn.:

-de neprotektataj popoloj (kiel albanoj);

-de popoloj, kiuj lau

serboj, havis diskuteblan identecon (kiel estis

konsiderataj makedonoj, montenegranoj, bosnianoj au

musulmanoj de Sandjak);

-de popoloj apartanentaj al malvenkitaj statoj dummilite (kiel estis

konsiderataj hungaroj kaj germanoj de Vojevodio).

Por krei la grandan Serbion, serboj ekspluatis la konstelacion au

la

raporton de la fortoj inter la grandaj potencoj de Europo dum la unuaj du jardekoj

de XX jarcento. La landoj de Antanto kie partoprenis Anglio kaj Francio,

subtenantoj de Serbio (ankau

de Grekio) estis la venkintoj de la mondmilito. La

antiserba faktoro dume-Germanio kaj Austrohungario estis la venkito. Dum

rusoj, pro ilia aparteneco al la slavo-ortodoksa familio estis kaj restis naturaj aliancanoj de serboj.

Okaze de fondigo de la granda Serbio, Parizo, Londono kaj Moskvo malrespektis ciujn principojn: tiun historian, tiun etnan, tiun demokratian, tiun pri la memdecido. La granda Serbio estis produktajo de la kompozicio de la politika mapo de Balkanio, konforme al la interesoj de Parizo (ankau de Londono), post la fino de la mondmilito, kie la antiserba flanko-la potencoj de la Centra Aksomalvenkis.

Estante tro petolita de Parizo, Serbio transformus la Versajan Jusoslavion en sian dominion.

La frenezajoj de serboj konsistis en tio ke ilia forto neniam estis bazita sur la realajn internajn eblecojn, sed sur la subtenon fare de ekstera faktoro. Krom dominantecon sur la popolojn inkluzivitajn en la staton de la sudslavoj, Serbio pretendis farigi ankaucefan faktoron en la regiono. La ambicioj de serboj por dominanti en la jugoslava stato au en Balkanio ciam estis malproporciaj al iliaj realaj eblecoj.

La problemo de serboj povas formuligi ankau kiel grandan songon de la malgranda homo. Serbio post la mondmilito, estis lando je malalta evoluskalo

generale. Aliflanke, aliaj du statformigaj popoloj de la Versaja Jugoslavio-kroatoj kaj slovenoj, kompare al serboj, havis ekonomie pli altan evoluskalon kaj pli grandaj kultuirajn tradiciojn. Serbio estis liberiginta de la jugo de la Bosfora malsanulo-Turkio, dume Kroatio kaj Slovenio eliris de jugo de imperio je europa civilizacio, tiu autrohungaria.

Kaj jen la unua paradokso: serboj je pli malalta civilizo, ekregus du popolojn je europa civilizo, kiel kroatoj kaj slovenoj. Baldau evidentigis ke la kreajo de Versajo –Jugoslavio, estis nur artefarita faritajo de Parizo (ankau de Londono). Gi staris sur argilajn piedojn. Tiaj paradoksoj apenau povus englutigi en Europo en XX jarcento, ec en ties komencigo.

Kunfrontigante al tia paradokso ekde komenco, serboj renkontis regadajn malfacilajojn. Por ke ebligu sian dominantecon, ili ekdisvastigis la ideon de jugoslavismo, tio estas la kreadon de la jugoslava nacio, subkomprenanta la serboslavan nacion. Por plenumi tion, la etnan hegemonismon de la sudslavoj, ili

komencis la konstruadon de la stato lau
unitarisma koncepto. Tio certigus al ili
hegemoniecon sur la ceterajn popolojn.

La Versaja Jugoslavio inkludis en sin tri statformigajn popolojn: serbojn, kroatojn kaj slovenojn, same popolojn al kiuj gi ne rekonis la naciecon, kiel albanojn, makedonojn, montenegranojn, bosnianojn, musulmanojn de Sandjak, bulgarojn, hungarojn, germanojn.

En tiu komunumo de la sudslavoj, enestis do ankau
neslavaj popoloj, kiel
albanoj, hungaroj, germanoj. Pri la agnosko de la nacieco decidis nur serboj. Ci lastaj regis neserbojn. La versaja Jugoslavio estis do serba imperio, rememoriganta tiun de caro Dusano. Pro fakto ke ciuj giaj popoloj, escepte de serboj, estis senigitaj de iliaj naciaj rajtoj, gi nomigis prizono de la popoloj.

La planoj de serbaj ideologoj por krei la jugoslavan nacion, neniam sukcesis, guste pro multaj kialoj:

-La proceso de la fondigo de homogenaj nacioj en Europo estis finiginta ekde pluraj jarcentoj;

-La homogena nacio ne povus kreigi en XX jarcento, kiel tion pretendis serboj;

-La homogena nacio ne povus kreigi per subpremaj, diskriminaciaj, administraj, kaj perfortaj rimedoj.

Unu el la plej konvenaj manieroj por krei homogenan nacion estas la integrigado de civitanoj en la socio kaj ne ties margenizado. Cetere estas sciite ke oni povas integrigi malplimultojn al la socio sed ne tutajn popolojn. La autoktonaj popoloj neniam povas fandigi kaj ne povas rezigni de sia identeco. La homogena nacio ne kreigas en Europon de XX jarcento au
XXI jarcento kiel
supozis serboj. La plej homogena nacio en Europo estas francoj, sed ili trapasis jarcentojn delonge por tiu celo.

Turkio, Irano au
Sirio neniam povus fandi la kurdan popolon en turkojn,
iranan au
sirian. Belgrado neniam povus krei la jugoslavan nacion, tio estas serboslavan, car serboj apenau
posedis sufican potencialon demografian,
ekonomian au
kulturan. Je ciu aspekto serboj estis je malalta nivelo kompare al

kroatoj kaj slovenoj. La neslavaj popoloj, kiel albanoj, hungaroj kaj germanoj de Vojevodio neniam rezignus de sia identeco. La popoloj je katolika ekzlezio kiel kroatoj kaj slovenoj, neniam povus fandigi en jugoslavojn je serboortodoksa dominanteco. La popoloj je islama eklezio kiel muslulmanoj de Bosnio kaj Hercegovinio kaj Sandjak, neniam fandigus al jugoslavoj je serboortodksa dominanteco.

Car albanoj estis neslavoj kaj tiel neniam integrigus en la komunumo de la sudlavoj, Serbio entreprenis kontrau
ilin rimedojn de etna purigado, samkiel agis
Grekio al la negrekaj popoloj. La realigon de la interkonsento de Belgrado kaj Ankara pri la translokigo de albanoj al Turkio antauhaltigis la inico de la Dua Mondmilito, kvankam la proceso reaktivigis ankau
postmilite, dum la jaroj 50 kaj
60 de XX jarcento.

La proporcio inter la serba kaj neserba logantaro en Jugoslavio de Krajlo estis io inter 30% al 70%. Alivorte la 30% serba logantaro de la jugoslava stato regis per diktaturo lau
koncepto de apartejdo la 70% neserban logantaron. Por
plenumi la administradon lau
koncepto de apartejdo, ciujn siajn potencialojn
serboj koncentrigis al la plifortigo de la subprema stata aparato, polico, armeo, jugadministrantaro.

La ampleksigitaj popoloj en ci tiu amalgamo de la unitarista kaj centralista stato ekzercis rezistadon al la serba dominanteco. Albanoj, ne estante slavoj, konsiderigis fremda karno en la komunumo de la sudslavoj. Ili estis nenatura parto de ci tiu kanglomerato, samtiel nenatura. Por subpremi la rezistadon de albanoj, kroatoj, slovenoj ka, Pasic
kaj Karagorgevicoj decidis ekzerci sur ilin
diktaturon. Belgrado piedpremis la homrajtojn, neis la ekziston de tutaj popoloj,
ec
tiuj historiaj kaj politikaj je grandaj tradicioj, je alta civilizskalo, ec
pli alta ol tiu
de serboj.

Antauci tiu prizono de la popoloj, Parizo (kaj Londono) staris okulfermite. Serboj estas la sola popolo en la historio de la homaro, kiuj en la parlamento estas mortigintaj deputitojn car ci lastaj protektis je politika vojo la homrajtojn de siaj popoloj. En la jaro 1928 unu deputito de la radikalaj serboj mortigis en la salono de la parlamento la kroatan deputiton Milan Radic.

La serba nacionalismo influis notinde al la primitivismo kaj provincialismo de la serba skolo, serba scienco kaj politika pensado serba. La serba scienco apenau
povis kunmarsi kun la europa scienco, aparte kun tiu okcidenta. La demokratiaj potencialoj de la serba socio dum Jugoslavio de Karagorgevicoj estis minimalaj. Sub la influon de la nacionalisma ideologio la serba socio de la Versaja Jugoslavio ne havis forton por produkti alternativan politikan penson au demokratiajn ideojn.

La serba megalomanio – Serboj sin konsideras la plej militeman balkanan popolon. Lau
ili nur serboj estas militintaj kontrau
osmanojn "je defendo de
europaj valoroj", ekde ses jarcentoj. La batalo kiu longis nur unu tagon estas manipulita por celoj nacionalismaj kaj ekspansionismaj kiel neniu alia batalo en historio. Kaj gi estas mispritraktita. Estas bone sciite ke en tiu batalo, krom serbojn estas partoprenintaj tuta koalicio kristana de la popoloj de Balkanio, inkluzive de albanoj. Serboj orgojlas per la ribelo I (1804-13), per la ribelo II (1814-15), per la partopreno en la turka-rusa milito (1878), per la Unua Balkana milito (1912), per la Dua Balkana milito (1913), per la partopreno en la Unua Mondmilito (1914-18),per la partopreno el la Dua Mondmilito (1941-44).

Pro ciuj ci militoj la serba historiografio donas diskuteblajn faktojn. Serboj ciam laugi estas envicigitaj en la justa fronto kaj en tiu venkonta. La kvazau serba scienco estas troiginta la dimensiojn de ci militoj, estas gloriginta la rolon

de serboj en ili, estas multobliginta la serbajn viktimojn. Car la rolo de serboj lau gi estis tiom granda, same la prezo tiom alta, sekve ankau
la rekomepenco por
serboj devas esti granda. Kaj tia rekompenco devus esti la kreigo de la Granda Serbio.

Per ci tiuj grandaj ideoj, ke serboj estas militema popolo kaj same viktimigita en Balkanio, estas nutrigitaj tutaj serbaj generacioj.

Petolitaj de la europaj politikaj decidpovaj centroj, petolitaj de kancelerioj de la historiaj potencoj de la kontinento, venkintaj en la mondmilito-de Francio (kaj Anglio), serboj evoluigis la sentojn de megalomanio, aroganteco kaj orgojleco. Aparte en ilia menso estas fiksita la megalomanio. Ili proklamis sin elektitan kaj diinan popolon, je misio por regadi ne nur la sudslavojn, sed ankau la ceterajn popolojn de Balkanio. Arogantece ili diris al la aliaj: Parolu serbe por ke ankau
Dio komprenu vin. Au
Dio, jes serboj.

Por kreskigi sian ekonomian potencialon, serboj entreprenis la eksspluatigon de la neserbaj regionoj de Jugoslavio de Krajlo. Belgrado en diversaj formoj, eskpluatis Kroation (ankau Slovenion), dum aliajn neserbajn regionojn kiujn gi nomis Serbion, transformis en kolonismajn mermatojn. Por pluteni ci tiun koloniisman sistemon, la serba doktrino konstruis juran sistemon diskriminaciantan, restriktan kaj subpreman aparaton, funkciigante ankau subpremajn rimedojn. Serboj farigis la mastroj de Jugoslavio kaj nekontesteblaj ties regantoj. Belgrado estigis metropolon kaj alloga areo por la aliaj, aparte por montenegranoj. Ciu tria belgrada civitano lau legendo estas ja montenegrano. En la postrestinta serba skolo formigis membroj el la ceteraj popoloj de Jugoslavio, krom kroatoj kaj slovenoj, kiuj posedis siajn proprajn lernejojn.

La antialbana ekstreme makedona lernejo estas ja produkto de la nacionalisma serba lernejo.

La serba hegemoniisma politiko renkontis rezistadon ce la ceteraj popoloj de Jugoslavio. En la jaro 1934 en Marsejlo de Francio okazis mortigtento kontrau la rego Aleksander Karagorgevic. Pro tio oni kulpigis la kroatajn nacionalistojn. Lau serboj, malantaue staris Berlino kaj Romo.

Malkomponigo de la Granda Serbio – En la jaro 1939, komence de la Dua Mondmilito, enfalis la Versaja Sistemo, Kun gi ankau

la ties kreajo, Jugoslavio.

La serba hegemonio ekdebuligis. Post la Dua Mondmilito naskigis la Jugoslavio de AVNOJ-o (Antifasista Konsilio de la Nacia Liberigo de Jugoslavio), respektive Jugoslavio de TITO. La unitarisma, hegemonisma, centralisma kaj statisma ideologio grandserba, pluvivis. Tio longis gis la jaro 1966 kiam en la insulo de Brioni de Adriatiko oni forigis el la politika scenejo Aleksander Rankovicon-Lekan (1909-1983), politikiston je okjarlerneja klereco, akirinta la metiarton de lanmantelisto en Belgrado. Lia forigo el la scenejo ebligis la federalismon de Jugoslavio, kiu gis tiam ekzistis nur surpapere.

En la jaro 1974, danke al Nova Konstitucio, notigis paso kontrau

la serban

dominantecon, guste pro dy vidpunktoj:

-unue, el Granda Serbio oni elsiris Kosovon kaj Vojevodinon.

-due oni mortfrapis al la serba unitarismo.

Tamen, serboj dum Jugoslavio de AVNOJ pasis ne tiom malbone.

-Unue, ankau
en ci tiu Jugoslavio federalisma ciuj serboj kunvivis en unu
stato;

-due, Josip Broz Tito, ekspluatante la antagonismojn pro divido de la
mondo en blokojn kaj la kontraudirojn inter ambau
superpotencoj (Usono kaj
Sovetunio) dum la Malvarma Milito, sukcesis certigi la ekonomian, financan kaj
militan subtenon de Oriento kaj Okcidento samtempe.

En la landoj de Tria Mondo, Josip Broz Tito trovis merkatojn, nafton kaj
krudmaterialojn je privilegiaj prezoj. Sed ankau
en Jugoslavio de TITO, samkiel
en tiu de Karagorgevicoj, multaj popoloj estis malkontentaj.

En la jaro 1967, serbaj akademianoj malhelpis al musulmanoj de Bosnio
kaj Hercegovinio sin identigi kiel bosnianojn. Por sin defendi de serba asimilado
la kunreligiuloj de Alija Izetbegovic
promovigis kiel musulmanan popolon.

Maje 1968 en la europaj metropoloj-Parizo, Londono, Berlino, Romo

eksplodis la studentaj protestoj. Inspiranto de ci tiuj protestoj estis la usona filozofo je germana deveno Herbert Markuze. La protestoj subtenigis de maldekstrema intelektula elito de la kontinento. La majaj protestoj eksplodis ankau
en Belgrado kaj Zagrebo.

La komunisma regimo de Tito respondis al studentoj kaj ties profesoroj per du manieroj: per subpremo kaj bolsevika demagogio.

Unu el la inspirantoj de la studentaj protestoj, profesoro de filozofio en universitatao de Belgrado Miladin Zhivotic, poste nesubigebla konstrauanto de la serba nacionalismo, mortis anatemite de militaj dioj, cekape de cefdion Slobodan Milosevic. Alia inspiranto de la studentoj, ankaxu li profesoro de filozofio en la sama universitato, -Mihajlo Markovic, duonintelektulo, finigis en la ruinajojn de la radikaloj de Seselo.

Oni konsideris ke Jugoslavio povus pluekzisti nur danke al la raporto de fortoj serbo-kroato-slovena. Por plifortigi tiun jugoslavan kohezion oni inventis la

lingvan sintagmon je politika malantauo, tiel nomatan serbo-kroatan lingvon, respektive kroat—serban lingvon kiu neniam rekonigis de la kroata scienco.

Komence de la jaroj 70 de XX jarcento, pro ekspluatado de Kroatio fare de Serbio, levigis la voco de amasa kroata movado konata kiel MASPOK (Masovni pokret, 1971). La kroataj nacionalistoj demandis: Kien iras miliardoj da USD enspezitaj danke al kroata turismo?! Serbio apenau posedis maron, nek industrion de la nafta ellaborado. Krome, serboj ne distingis sin kiel tro laboremaj. Verdire oni povus demandi: kiamaniere serboj, aparte belgradanoj sukcesis vivi je alta standardo?!

En tiu Jugoslavio do, ciuj plendis pro ekspluatigo. Ili kontraustaris kiel Jugoslavion antau 1974, tiel gin post 1974. Kroatoj kaj slovenoj konsideris ekspluatantoj serbojn, dume ci lastaj kulpigis pro sia postrestanteco la nordajn respublikojn.

Unu kozo estis bone konate: pli piedpremitaj estis albanoj, pli ekspluatite estis Kosovo. Tiutempe cirkulis la dirajo: Trepca laboras, Belgardo konstruas.

Ankau en ci Jugoslavio (de AVNOJ-o) parto el la budgeto iris por la armeo, por la polico, por la sekretaj servoj kaj por administrantaro je kolosaj dimensioj. Legendo diras ke la armeo de Jugoslavio de Tito, lau

sia forto, estis

kvazau

la kvara en Europo. La malkontento de la popoloj al la Jugoslavio de AVNOJ-o atestas ke ci stato estis artefaritajo, starigita sur la ruinajoj de la versaja Jugoslavio, ci kreajo tiom artefarita kiel la unua de la Historiaj Potencoj de Europo-Moskvo, Parizo kaj Londono.

Kohezianta faktoro de Jugoslavio de AVNOJ-o ne estis la Komunista Partio de Jugoslavio (Komunista Ligo), nek la tiel nomata Popola Armeo de Jugoslavio. Integriga faktoro de la lando estis la personeco de Josip Broz Tito. Tion oni bone komprenas aparte post lia morto, kiam la jugoslava amalgamo estis malkomponiganta. Ekde dum la tiel nomata Naci-liberiga milito (1941-44) oni kemencis starigi la kulton de Tito.

La unua defio pri malkomponigo de Federativa Respubliko de Jugoslavio alvenis de albanoj en la jaro 1981.

-Albanoj, kvankam popolo je tria vico launombrte, estis malegalaj;

-Kosovo, malgraxu giaj subteraj ricajoj, estis ekstreme malevoluita.

-En la jugoslava komunumo, albanoj estis neslava popolo (ni estas albanoj, ne jugoslavoj-ili diris);

-Al la jugoslava komunumo albanoj estis algluitaj kontrau sia volo;

-la solaj kaj eternaj logantoj de la politikaj jugoslavaj prizonoj estis cefe albanoj;

-la historia memoro ne permesis al albanoj rekoni la legecon de la jugoslava stato.

-la najbareco al la patrino Albanio rememorigis ke ili estis fremdaj en ci stato kaj

-Jugoslavio estis por ili nur kvazaupatrino.;

-Albanoj kvankam en tria vico launombre ne guis la statuson de la nacio. Dume, nacion oni konsideris montenegranojn kiuj estis sesono launombre kompare al albanoj. Cetere launombre albanoj estis pli ol slovenoj, musulmanoj de Bosnio kaj Hervegovio, ol makedonoj kaj montenegranoj.Tamen, ili

konsiderigis kiel duarangajn civitanojn, tian komunumon ili konsideris nenaturan kaj malliberan.

Renaskigo de la serba unitarismo – En la jaro 1985 en Serbio komencigis la renaskigo de la grandserba doktrino. La akademiaj, universitataj, ikntelektulaj, ekleziaj, politikaj kaj militistaj cirkloj serbaj sin engagis je servo de ideo de Grandserbio. La akto de la tragika dramo estis komencante. Estas la tempo posttitisma. La serbaj nacionalistoj vekriis la tragikan sorton de sia popolo. Tion kion serboj akiras dummilite ili perdas dumpace-onidiris.

Kulpanto pro la serba tragismo estas lau ili la agento de Vatikano-Josip Broz, car:

-En la Dua Kunveno de AVNOJ-o, okazinta en Jajce de Bosnio kaj Hercegovinio je 29. XI. 1943, li estis forpreninta de Serbio Bosnion kaj Hercegovinion, Montenegron kaj Makedonion;

-En la jaro 1974, per la nova konstitucio, li estas forpreninta de Serbio ambau

regionojn-Kosovon kaj Vojevodinon igante ilin konsistigajn partojn de la jugoslava federacio, tiel egaligante de facto ilin kun la ceteraj ses respublikoj;

-Per la nova konstitucio, li estas federaciiginta la staton, lasante tiel al la manoj de la sorto serbojn de Kroatio, Bosnio kaj Hercegovinio kaj Kosovo;

-En Kroatio estas reviviginta Pavelico kaj Maspok-o, en Bosnio kaj Hercegovinio-muhagidinoj, en Kosovo-irendentistoj;

-Serboj estas viktimoj. Ciam kaj cie viktimojn. La ceteruloj estas ties subpremuloj.

Cu tio ne rememorigas la anekdoton pri la lupo kaj safido?!

La serba nacionalisma, primitivisma kaj provincialisma skolo ne kapablis do antauvidi la politikajn, demokratiajn kaj ekonomiajn evoluojn je vasta plano. En la jaro 1985-86 la serbaj akademianoj lancis memorandumon antauvidanta la revenon al la tempo de karagorgevicoj. Ci tiu memorandumo je 200 paga, aperis januare 1986 kiel senautora libro, kvankam por gi estis laborintaj ok plej konataj

akademianoj de la Serba Akademio. Inter ili estis ankau

Lubomir Tadiq, patro

de la nuna prezidento de Serbio, Borios Tadic

kaj amiko de Dobrica Cosic.

Ci tiku memorandumo:

-neis la federalismon de Jugoslavio lau

Konstitucio de la jaro 1974;

-nuligis la autonomecon de du regionoj-Kosovo kaj Vojevodio;

-Ignoris Makedonion, Montenegron kaj Bosnio kaj Hercegovinion;

-Jugoslavio laugi devus reveni al unitarismo, centralismo, statismo kaj serba dominanteco.

Kiel iame, gi devus transformigi al Serboslavio. La historia rado devus retroiri je la komenco de XX jarcento, ec pli profunde, en la tempo de Dusano.
Devus aktualigi la nacia serba projekto el la jaro 1844 – Nacertanija de Ilija Garashanino. Devus revivigi la ideoj de serbaj akademianoj de la komenco de XX jarcento, Jovan Cvijic, Vladan Gjorgjevic (autoro de la antialbana libro fifama Arnauti i Velike Sile, Belgrado, 1913). Devus aktualigi la fifama ellaborajo Iseljavanje Arnauta de akademiano Vasa Çubriloviq, kiun li prezentis en la Serba Kultura Klubo en Belgrado, marte 1937. La verkisto Dobrica Qosiq, surnomate kiel patro de la serba nacio, akademiano je mezgrada agrikultura lernejo, estis ja la cerbo de memorandumo supre menciite.

La detruigo de ekvilibro starigita en la jaro 1974 ne akceptigis de la nordo de la lando. Jus gi aperis, estis konsiderite de kroatoj kaj slovenoj kiel nekrologio de Jugoslavio.

La falo de komunismo (panslavismo) – Je la fino de jaroj 80 de XX jarcento, komunismo, tio estas, panslavismo enfalis je planedaj dimensioj. Nun Serbio, samkiel tiam, kiam enfalis la Versaja sistemo, perdis sian potencan subtenanton. La raporto de fortoj en Europo kaj je globala plano-sangigis. Kreigis nova konstelacio, malfavora al serboj.

Alivorte, ni havas:

-la falon de komunismo kaj malkomponigon de la sovetia imperio;

-Malkomponigon de la Varsovia Traktato;

-El malkomponigita Sovetunio eliris nestabila Rusio;

-Falon de la Berlina muro kaj reunuigon de Germanio;

-Malkomponigon de Jugoslavio;

-Usono restas unusola superpotenco;

-Nato-o plilargigas;

-Europa Unio plilargigas.

En la jaro 1991, Serbio komencis konkerajn militojn en eksa Jugoslavio, ignorante la supremenciitaj cirkonstancojn.

La militoj en eksa Jugoslavio post la jaro 1990 venigis Usonon en la regionon.

La perdinto de ambau
mondmilitoj, Germanio, farigis unu el plej gravaj
faktoroj de la novaj evoluigoj geopolitikaj. Anstatau
rimarki la sagigojn alportinta
la fino de XX jarcento, la serba inteletularo-tipa balkana-bazite en milita serba potencialo, daurigis per siaj anakronikaj ideoj de XIX kaj XX jarcentoj. Ili homogenigis la serban socion. La mezepoka serba mito pri la batalo de Kosovo revivigis kiel fantomon. Retropaso ne eblis.

Reagante, la nordaj respublikoj entreprenis la disigon de la ungegoj de Belgrado. La populisma politiko serba kaj militinstiga retoriko transformigis en

militan agresion. La artefarita kreajo malkomponigis sangume. Nun la inspirantoj serbaj de la milito eldirus: Serbio etendigas gis tie kie estas la fina tombo de serbo. La naciaj patroj, plimulto duonintelektuloj tentos rekomponigi per konkeraj militoj la Grandan Serbion de la jaro 1913, respektive de la jaro 1918. Per la konkera armeo jugoslava, ciam komandita de serboj, Serbio militis kontrau Slovenion, Kroation, Bosnion kaj Hercegovinion kaj Kosovon. Jugoslavio, tiu plej artefarita kreajo konata de historio de la mondo, entombigis porciame. La supremenciitaj militoj de Serbio por fremdaj teritorioj disfalis lauvice. La jaroj 90 de XX jarcento notas la honton de la serba historio.

Antauci tiu golgoto de popoloj, la maljuna Europo, aparte Francio el la tempo de Fransua Miteran fermis la okulojn.

Jugoslavion kie ciuj serboj kunvivas en unu stato detruis mem serboj. Ili kauzis 250 mil mortigitojn, milojn da vunditoj, malaperintoj kaj milionojn da rifugintoj. Same nekalkuleblajn materiajn damagojn. Tiuj serboj ne pensantaj kiel la naciaj patroj forglutigis de la mallumo. Baldau post ci tiu dance macabre, la

falangoj de Sesel kaj Milosevic
ekzekutis la demokratan cefministron – Zoran
Gingic.

Serbio ne volis kompreni ke Slovenio, Kroatio kaj tri milionoj da albanoj
estis plenbuso neforglutebla.

Serbio estis malgranda por ke gi sajnigu granda.

La tragedio de serboj konsistas en la fakto ke la akademia kaj politika elito
ilia ne komprenis iam ajn ke Serbio, antau
ol esti produkto de la interna historia
realeco, gi estis kreajo de la fremda faktoro, en certaj historiaj momentoj.

Pro la disfalo ta al ili, serboj kulpigis Vatikanon, Berlinon, Vienon, CIA-n
samkiel la agenton de Vatikano-Tito-n, kies kadavron ili ec
volis eltombigi kaj
forjeti en Sutjeska-n au
Komrovco-n.

La proceso de malkomponigo de granda Serbio ankorau
ne finigis. Serbio
kun la orienta Kosovo (Presevo, Bujanovco, Medbego), Vojevodio kie logas la
autoktona hungara logantaro kaj 26 aliaj minoritatoj, kun Sandjak logata cefe de
muslulmanoj kaj bulgaroj sudoriente de la lando-daure estas granda. Ankau

mem serboj diras: Tiel kiel ni estas komencintaj, ni reduktigos en pasaolandon de Belgrado.

Pro domagoj faritaj dum unu jarcento:

-Serbio devas jugigi antau
la internacia jugejo pri militkrimoj kontrau
homaron;

-la serba parlamento devas pardonpeti al la popoloj de eksa Jugoslavio, aparte al albanoj;

-Gi devas pagi reparacion kaj militrekompencon pro jarcenta kolonialisma kaj genociisma politiko;

-Devas naskigi ia serba Orhan Pamuk, kiu defendis kurdojn, por ke tiu popolo travivu katarzon.

Iam Serbio ignoris Kosovon-respubliko, nun gi devas agnoski la Respublikon de Kosovo.

La solaj subtenantoj de Serbio hodiau estas rusa cefkomunisto Jirinovski, eksa agento de KGB, nun cefministro Putin, Fidel kastro, Muamer Gadaf, Hugo Cavez, cefo de la greka komunista partio Aleka Paparija kaj Vjetnamio.

Popola proverbo eldiras: Montru kun kiu vi akompanatas por ke mi diru kiu vi ja estas.

De supre dirite evidentas ke Serbion subtenas hodiau la plej senkredititaj elementoj de historio de la globo. Sed la intelektulaj kaj politikaj cirkloj de Belgrado hontas montri al sia popolo pri tio. La serban nacionalismon apenau subtenas ec la iamaj siaj aliancanoj.

La vojo de serboj al la abismo dauras kun V. Kostunica, Nikolic kaj B. Tadic. Serbio danke al ili estas transformigante al kolonio de Rusio en Balkanio. Moskvo per ili celas realigi la geostrategiajn aspirojn de la norda urso en la regiono. La perspektivo de la serba junularo estas ja la savigo de nacionalsimaj konvulsioj kaj aspiro al europa integrigo.

Serbio demokratiigos:

-kiam gi rezignos de garasaninaj songoj kaj

-kiam nacian sian intereson estu la integrigo al la euro-atlantikaj strukturoj.

La agnosko de la sendependeco de Kosovo samkiel de ties teritoria entuto estas conditio sine qua non de la demokratiigo de Serbio kaj ties integrigo al NATO-o kaj EU.

La historiaj procesoj supredirite estas favoraj al albanoj kaj malfavoraj al serboj. La poralbana faktoro en Europo kaj globplane estas dominanta. La XXI jarcento estas ja la jarcento de albanoj. Ci tiun historian momenton neripetebla albanoj devas sciipovi kiel ekspluati.

Uwe kaj Ursula Moritz

Aspektoj de Balkanio

Historio en la nuno de Sarajevo gis Tirano

Prefere malfrue ol neniam

Dum la milito en Bosnio kaj Hercegovino (1992-1995), la pluekzistado de tiu stato estis minacata ne nur far la enlandaj serboj, sed-en certaj periodoj-ankau flanke de la bosniaj kroatoj. Ci ties armeo, la 9a-an de novembro 1993, estis bombardante detruinta la “Turkan Ponton” el la jaro 1566. Admirante, en 2001, la restojn de tiu ci ponto en la urbo Mostar, ni promesis reveni, kiam la restaurado estos finita. La laboroj finigis, kaj en 2004 oni inauguris la grandioze renovigitan konstruajon (pagitan far Turkio), sed nia vizito prokrastigis gis septembro 2010.

La detruo de tiu ci ponto, cetere ne uzebla por autoj, estis barbarajo, evidenta artifiko de psikologia militado. Car la objekto havis nenian taktikan au strategian utilon, sed la celo de gia forigo ja estis provo forvisi gravan elementon el la konscio de la homoj: videblan memorigilon pri la kontribuo de la turka arkitekto Hajrudin al la kulturo. Estas imageble ke la kroataj armeanoj volis kontraumisiisme forstreki kvincent jarojn el la historio de Bosnio kaj Hercegovino. Kia frenezajo!

Kiel fartas la homoj dek-kvin jarojn post milito?

En Sarajevo kaj Pristino, niaj du unuaj haltejoj, la militoj de 1992-1995 respektive de 1998-1999 estas videblaj au palpeblaj tre klare, kvankam diversmaniere.

Bosnio kaj Hercegovino-cu eblas tri en unu?

Kompare al 2001, la aspekto de pluraj lokoj de nia limpasejo apud Slavonski Brod gis Sarajevo inkluzive evoluis pozitive. Malgrau la pluekzistado de multaj ruinoj, precipe en la kamparo, oni tuj vidas riparitajn kaj novkonstruitajn domojn kaj stratojn, kie promenas homoj tiel vestitaj ke fremdulo estas gojige surprizita. En la vendejoj abundas ciaj varoj, kaj ne mankas la acetemuloj. Memkompreneble, ni tute ne scias cu tiaj impresoj korespondas kun la vera situacio de la socio. Ciukaze ni vidis ankau almozpetantajn infanojn kaj plenkreskulojn.

Pligravas la nevideblaj spuroj de la militaj detruoj. La stato de Bosnio kaj Hercegovino trovigas sub tre peza damokla glavo: La plimulto de la serbaj politikistoj ofte ripetas la minacon ke ili memstarigos la Serban Respublikon1. Car por tion atingi ili bezonus fortan

1 Nepras konscii pri la diferenco inter la “Serba Respubliko” (cefurbo: Banja Luka), kiu estas regata far de serboj en Bosnio kaj Hercegovino, kaj la “:Respubliko Serbio” (cefurbo: Beogrado), kiu estas suverena stato.

subtenon flanke de Respubliko Serbio, almenau provizore tia evoluo sajnas ne realisma pro la klopodado de Serbio proksimimigi al la Europa Unio. La nuna bojkotado de multegaj projektoj far la serbaj radikaluloj paralizas nepre bezonatajn reformojn, kies efektivigo plifaciligus la vivon ankau de serbaj civitanoj. Pri cio ci ni havis ampleksan intervjuon kun profesoro d-ro Safet Halilovic, la tutstata ministro pri homaj rajtoj kaj rifugintoj. –

Intervjuo kun s-ro Safet Halilovic

En tuj sekvinta interparolado, la asista ministrino, s-ino Saliha Djuderija, detaligis kelkajn aspektojn.: Antau la milito en Bosnio kaj Hercegovino estis registritaj 17 etnaj minoritatoj, inter kiuj la plej ampleksaj estis la romaa, juda, ukraina, slovaka kaj rumana; en Sarajevo agadas asocioj de italoj, slovenoj, germanoj kaj cehoj, dum ukrainoj kaj rumanoj vivas kompakte en la urboj Prnjavor kaj Prijedor (norda Bosnio). Nuntempe la nombro de minoritatanoj, kompare kun la totalo de enlogantoj, estas neglegtebla. Karakterize por la disfalo de Jugoslavio okazis etna distavoligo kaj hegemoniigo de bosnoj, serboj kaj kroatoj kaj pligrandigo de tiu specifa “etna” kategorio deveninta el miksitaj geedzecoj, kiuj iam deklaris sin “jugoslavoj” kaj en la novaj cirkonstancoj nomas sin “bosnianoj”. La romaoj, kiuj estas cirkau 30 000 kaj ne havas metropolan

[“Patrinan”] staton, estas la plej granda problemo, kaj dum la Jardeko de la Romaoj la stato dedicas plej grandan atenton al plibonigo de la situacio de tiu minoritato. – Kvankam estas garantiata al la minoritatoj la rajto pri instruado en la gepatra lingvo, tio ne estas generale realigebla pro la malgrandega nombro dise tra la lando. Tiujn lingvojn oni uzas por kultura aktivado, ekzemple, eldonado de literaturo, sed ilia uzado, kun tradukado, ce tribunalo estas garantiita. Lau
la lasta popolnombrado, en 1991, la
